

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)



**Boulton, Golden, Lagrange kaj Modest
pri Esperanta teatro**

Disko *Esperanto* tutmonden

Balta movado

**Bjalistoko:
Zamenhof-centro malfermita**

Enhavo

- 201 Informado: Ago-Tago ekstreme varia
- 202 Du lumpunktoj en Pollando; Mazi instruas televide (Roman Dobrzyński); Por Muzeo Zamenhof en Bjalistoko (Jarosław Parzyszek)
- 204 Kulturo: Cent jarojn post la lanĉo, kia teatro? (Marjorie Boulton, Georges Lagrange); Por eduki aktorojn kaj maturigi publikon (Bernard Golden); Tamen iam... (Julian Modest)
- 206 Skulptistoj, ceramikistoj!
- 208 Esperanto en radio: Internaciaj radioelsendoj en Esperanto (OSIEK-AERA); Esperanto, radio kaj TTT (Bruno Masala); Adresoj
- 209 Muziko: Esperanto-disko sonas tutmonde (Marcos Cruz)
- 210 Kongresa Komunikado 2 de la 82-a Universala Kongreso en Adelajdo
- 211 Eŭropo: Baltio: faroj malgraŭ baroj (Andy Künzli)
- 212 Interlingvistiko: Aplikata interlingvistiko, de latino ĝis Ido; Memore al Ostwald (Detlev Blanke); Festi konferencoj en Budapeŝto (László Szilvási)
- 213 Eksteraj rilatoj: Ĉeesti, observi, informi (Renato Corsetti) Akademio de Esperanto: Ĉu lingva fajrobrigado? (Amri Wandel)
- 214 Recenzo: *Sveda alumeto, Princidino Mary, La unua amo* (Nina Korĵenevskaja)
- Foliume
- 215 Laste aperis
- 216 Fake – Loke – Persone
- Anoncetoj
- 218 Nekrologoj: Norman Williams (1908-1996); Ada en ĉies koroj
- 219 Indekso 1996
- 220 Oficiala Informilo

Vi trovos

eble elreviga la ideon ke la Esperanto-centro en Bjalistoko, kiun en 1987 oni planis kvazaŭ grandiozan kultur-pilgrimejon en Pollando, realiĝas en 1996 laŭ multe pli modestaj dimensioj kiel inform-oficejo. Sed estas ja estiminde ke la projekto ne entute surrifigis inter la skuaj ondoj de la novkapitalisma maro pollanda, kie etoso tradicie favora al Esperanto tamen ebligas eĉ tiajn surprizojn kiel tutlanda televida dissendo de la *Mazikurso* por milionoj da spektantoj (p. 202-203). La defio, kiel ĉiam, jenas: kiel restigi la ekinteresitojn en la E-komunumo?

Post februara artikolo de Zofia Banet-Fornalowa pri la komenco de la E-teatro (p. 22), jarfine ni denove omaĝas al tiu 100-jara ĝenro de la verda kulturo. La nunajn iom teoriajn kontribuojn (p. 204-207) ankoraŭ sekvas venontjare prezento de kelkaj artistoj.

Ĝuu sane kaj saĝe la festojn kiujn la jarfino alportas. En 1997 ni renkontiĝu, kiel ĝis nun — en via poŝtkesto.

La kovrilo: Louis C. Zaleski-Zamenhof, Povilas Jegorovas kaj Osmo Buller (de maldekstre) ĉe la malfermo de la Bjalistoka Zamenhof-Centro. (Foto: J. Parzyszek)

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Redaktofino: la 10-a de la antaŭa monato. **Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 61; US\$ 35; GM 55; enoj 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1940, 1/2 p. 1075, 1/4 p. 580, 1/8 p. 320, 1/16 p. 175. Movada rabato 50%. Ekstera-kovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +31-10-436-1044.

Telefaksa: +31-10-436-1751.

Elektronika poŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la CO: Pasquale Zapelli.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎ +82-53-950-5425 [of], +82-53-765-0880 [h]; ☎ +82-53-950-6247 [of], +82-53-765-0881 [h]; ☐ keast@soback.kornet.nm.kr.

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado, kulturo): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-6-39-72-61-98; ☎ +39-6-39-72-61-69; ☐ mc8750@mcLink.it.

Estrarano (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎ +31-528-341214 [h], +31-50-3613769 [of]; ☎ +31-50-3613763 [of]; ☐ a.f.de.geus@td.azg.nl.

Estrarano (eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎ +1-613-565-9282; ☎ +1-613-565-9279; ☐ mfettes@magi.com.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio; informado): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎ +370-7-739776 [h], +370-7-209781 [of]; ☎ +370-7-228616 [of].

Estrarano (faka kaj scienca agado; lingvo): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎ +972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ☎ +972-2-658-4437 [of]; ☐ amri@vms.huji.ac.il.

Ago-Tago ekstreme varia

Dum la jaro, Esperanto devus plej frapi la atenton en la Ago-Tago. La heterogena rikolto de la ĉi-jara Tago montras ke tio sukcesas en unu lando kaj fiaskas en alia. luloke malhelpas polico, alilande helpas koincida televid-elsendo, eĉ statuo ŝtelita.

Brazilo: Memortabulo

Kun apogo de la urbestro, la E-Klubo de la urbo Taubaté (ŝtato San-Paŭlo) inaŭguris arte prigravuritan granitan platon en la placo Esperanto, proksima al la urbocentro. (A.G. de Almeida)

Sur la ĉefplaco de la samŝtata urbo Campinas, Kultura Centro de Esperanto "reklamis la markon Esperanto"

en stando kun kelkaj libroj, disdonante ĉ. 2 000 faldfoliojn. Ĝiaj aktivuloj krome ĉeestis en la semajnfino ŝtat-nivelan renkontiĝon de edukistoj, prezentante la vidbendojn *Mazi kaj Esperanto, pasporto al la tuta mondo* [vd. okt., p. 166]. En ambaŭ okazoj ili vendis perkomputilajn E-kursojn.

En Passos, malgranda urbo en la ŝtato Minas Gerais, fondiĝis nova



Parizo: Komune ĉe kulturcentro

Anoj de diversaj Parizaj E-asocioj montris sian kunlaboremon en la kampo de informado, kiam la 12-an de oktobro ili disdonis, en malgrandaj grupoj, pli ol 10 mil informilojn al homoj starantaj en 200-metraj atendovicoj ĉe la kulturcentro Pompidou, en la koro de Parizo. Videblis granda sloganbendo, kaj estis larĝe disprezentata la Manifesto de Prago. (R. Triolle)

Praga Manifesto

Ĝis la redaktotfino la Centra Oficejo ricevis subskribojn de 3134 homoj por la Manifesto de Prago (inkluzive de tiuj kolektitaj dum la UK). La CO plu akceptas subskribojn, kolekteblajn ekz. dum la Zamenhof-tagaj aranĝoj.

La Informa Fakto daŭre disponigas diverslingvajn tradukojn laŭ peto. Elektronikaj variantoj en pluraj lingvoj estas legeblaj en la TTT-paĝo de Sveda E-Federacio: <http://www.esperanto.se/>.

grupo laŭ iniciato de Alexsandro Cesário. Ĝi organizis en la municipa kulturdomo dusemajnan ekspozicion, kiu kulminis Ago-Tage per prelego de delegito J.O. Veiga Rodrigues al 150-kapa publiko. (J. R. Piton)

Ĉinio: Pekina pluvego

Pro pluvego ĉ. 20 esperantistoj kunvenis ne en parko sed en restoracio funkciigata de e-isto. Tie ili konigis E-on al la vizitantoj per fotoj. Samtempe respondecujo de Ĉina E-Ligo kaj Pekina E-Asocio diskutis pri la maniero prezenti nian lingvon al ĵurnalistoj. (Bai Son)

Francio: Multloke subĉiele

El Bordo Gisèle Gizard raportas pri kontaktoj kun 17 komunumoj ĉirkaŭ la urbo; du urbestroj konsentis anonci la Ago-Tagon per lumpaneloj. Lokaj aktivuloj disdonis flugfoliojn en 6 subĉielaj bazaroj kaj antaŭ 6 preĝejoj post la meso. Ili gluis afiŝojn ĉe komercistoj kaj urbaj bibliotekoj.

En Tuluzo surstrata manifestacio estis direktita ĉefe al universitatoj. La e-istoj de Thionville enketadis ĉe klientoj de la ĉefa poŝtofiĉejo, kiu akceptis tutsemajnan E-ekspozicion. En La Ciotat E-budo staris en foiro de asocioj. En Kalezo Julien Ducrocq prezentis E-librojn kaj la Pragan Manifeston en librovendejo; rezultis trafa artikolo en regiona ĵurnalo. En Bulonjo-sur-Mar la loka gazeto raportis pri ekspozicio en la urba biblioteko. (C. Nourmont)

Hungario: La enŝteliĝo de L.Z.Z.

En Budapeŝto jam antaŭ du jaroj oni rimarkis la malaperon de la Zamenhof-statuo el la Esperanto-Parko, sed neniu oficiale anoncis ĝin. Nun tiu ŝtelo iĝis la centra evento de la Ago-Tago. La amaskomunikiloj unue ricevis informon pri planata soleno, kun florkronado de la statuo, memore je la 100-jariĝo de E-o en Hungario kaj de la E-teatro. Post tri-kvar tagoj nova faksmesaĝo anoncis la ŝtelon (ankaŭ al la polico kaj urbodomo), kun la mencio ke florkronado tamen okazos samloke, ĉe foto de Zamenhof. La kreita sensacio allogis, krom ĉ. 100 esperantistoj, stabon de televido kaj gazetistojn. Favoris la diskonigon partopreno de tutlande konataj geaktorj, Ildikó Pécsi kaj György Bánffy. Pri la soleno raportis preskaŭ ĉiuj ĵurnaloj, televido, aŭdiĝis intervjuoj en radio. Du gazetoj eĉ komencis propran esploron — kaj ambaŭ trovis la statuon, pri kio ili grandlitere fanfaronis. (Siatempe iu deprenis sed ne sukcesis forporti ĝin; promenantino poste ĝin trovis en apuda arbedo kaj portigis ĝin al Galerio Budapeŝt.) Pro la multigo de la ĉi-tamaj artikoloj aperis intereso pri Esperanto ankaŭ ĉe aliaj programoj de radio kaj televido. (Eventoj)

Koreio: Prezidanto helpis

Lokaj esperantistoj, i.a. UEA-prezidanto LEE Chong-Yeong, disdonis informilojn en stratoj de Taegu.

(daŭriĝo ĉe p. 207)

Du lumpunktoj en Po

La 12-an de oktobro d-ro Louis C. Zaleski-Zamenhof kaj la vicurbestro de Bjalistoko, Marian Blecharczyk, kune malfermis simbole la pordonde la Zamenhof-Centro. En la sama tago Pola Televido komencis elsendi la E-kurson *Mazi en Gondolando*, por spektantaro de ĉ. 7 milionoj.

Ĉeestis la malfermon la ĝenerala direktoro de UEA, Osmo Buller; UEA-estrarano Povilas Jegorovas; la prezidantino de Fondumo Zamenhof, d-ro Hanna Konopka; pluraj reprezentantoj de la lokaj aŭtoritatoj; kaj, kompreneble, multnombro alvenintaj esperantistoj.

La inaŭguro komencis novan etapon en la historio de la Bjalistoka Centro. Kiel sciante [vd. maj., p. 85], la unua projekto, kiun grandparte konceptis d-ro Humphrey Tonkin, havis imponajn dimensiojn. Tamen la abruptaj sociaj ŝanĝoj en Pollando malebligis realigi la planojn, sekve la institucio kiu respondecis pri ili, Fondumo Zamenhof, perdis sian ekzistokialon. Tamen kelkaj personoj ligitaj kun la ideo ekde la komenco ne avaris sian tempon kaj eĉ monon por vivteni la Fondumon. Ili estis Jarosław Parzyszek kaj Michał Doliński, kiu bedaŭrinde forpasis ĉi-jare; krome Ewa Siurawska kaj Roman Dobrzyński, kiu dum tiu malfacila periodo prezidis la Fondumon.

Kreiĝis nova situacio post la inaŭguro de la Infankliniko D-ro Ludoviko Zamenhof (1992), kaj precipe post la ekhavo de fonduma sidejo, multekosta nemoveblaĵo centre de Bjalistoko [vd. detalojn en majo]. En tiu tute nova perspektivo por nia agado, rekonstruiĝis la estraro, kun d-rino Hanna Konopka kiel nova prezidanto. Dume daŭris diskutoj pri kiel plej profite utiligi la sidejon. La estraro decidis establi tie informcentron Ludoviko Zamenhof pri kulturo kaj turismo, kiu aparte emfaze informos pri la Zamenhof-itinero, kondukanta ankaŭ al Bjelorusio kaj



Jarosław Parzyszek, Povilas Jegorovas kaj Osmo Buller (de maldekstre) parolas al regionaj radioj kaj televido ĉe la malfermo de la Zamenhof-Centro.

Litovio. La akceptitan solvon oni konsideras eksperimento; ni observos kiel ĝi funkcias kaj kiajn profitojn la Fondumo havas. Momente ni ne havas kostojn. Povus okazi ke ekde 1997 la urbaj instancoj kovros ĉiujn funkciad-kostojn de la Centro.

Dume la Fondumo devas rekonsideri sian strukturon. La estraro konsistas el 12 personoj reprezentantaj 10 instituciojn kaj organizaĵojn, kio kaŭzis daŭrajn kvorum-problemojn. En la nova strukturo aperos okpersona komitato, kiun konsistigos reprezentantoj de UEA, TEJO, ILEI, Pola E-Asocio kaj Bjalistoka E-Societo, krome el Bjalistoko la Universitato, urba kaj vojevodia instancoj. La komitato elektos kelkpersonan estraron, kiu havos plenumajn taskojn. La ŝanĝoj certe aktivigos la Fondumon, kiu cetere havas unikan konsiston: ĝi estas Esperanto-institucio en kiu partoprenas ankaŭ neesperantistaj instancoj. La Fondumo starigis antaŭ si la prioritatan taskon: rekonstrui la naskiĝdomon de Ludoviko Zamenhof. La projekto troviĝas nun en la fazo de seriozaj studoj.

*Roman Dobrzyński (Pollando)
Prezidinto de Fondumo Zamenhof*

Por Muzeo Zamenhof en Bjalistoko

En la sidejo de nia Fondumo funkcias nun Turisma kaj Kultura Informcentro Ludoviko Zamenhof, fondita kun Bjalistoka Agroturisma Societo, kun la financa subteno de Fondaĵo de Evoluoj de Bjalistoka Vojevodio kaj de la firmao ENERKOM, gvidata de eks-estrarano de nia Fondumo, Jerzy W. Slezak. En la Centro du ĉambroj jam havas siajn patronojn: ges-rojn Linja (Finnlando) kaj s-ron Onisaburo Deguĉi, la spiritan gvidanton de Oomoto. Kadre de la Centro ni organizas Muzeon pri Ludoviko Zamenhof. Bedaŭrinde ni ne posedas fotojn, leterojn aŭ dokumentojn ligitajn kun Zamenhof. Ni petas vin helpi al ni organizi la ekspozicion sendante kopiojn de montrindaj dokumentoj kaj fotoj.

Nia informcentro kunlaboras kun la Vojevodia Publika Biblioteko en Bjalistoko, kie estas deponitaj la libroj kaj revuoj transdonitaj de la Fondumo. La plej grandaj libro-donacintoj por tiu E-biblioteko estas Internacia Esperanto-Instituto en Hagoo, Hungaria Esperanto-Asocio, Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, Birthe Lapenna, Rikardo Ŝulco kaj Jarosław Parzyszek. En la biblioteko tamen mankas novaj revuoj, diskoj, sonbendoj, vidbendoj, libroj kaj komputilaj programoj. Ni esperas daŭran subtenon de la tutmonda esperantistaro.

*Jarosław Parzyszek
Sekretario de la Estraro de Fondumo Zamenhof*



D-rino Hanna Konopka,
prezidanto de Fondumo Zamenhof

Mazi instruas televide

La kanalo 1 de Pola Televido komencis elsendi la 12-an de oktobro la E-kurson *Mazi en Gondolando* en la tre populara programo *5+10+15*, destinita por infanoj kaj gejunuloj, sed volonte spektata ankaŭ de plenkreskuloj.

Tiu lanĉo rezultis el sufiĉe longa strebado. Tomasz Wojciechowski, estro de Tommy, la pola firmao kiu produktis la E-version de *Mazi*, sugestis al Internacia E-Instituto (Hago) rearanĝi la filmon laŭ bezonoj de konkreta programo de Pola Televido. Ĝuste *5+10+15* elsendis kelkfoje la anglan originalon de *Mazi*, sed ĉiam en kvinminutaj pecoj. La granda populareco de la kosma verdulo ĉe la juna spektantaro faciligis entelevidigon de la E-versio. La estraro de IEI decidis subvencii la por-televidecan version de *Mazi*. Mi tuj eklaboris laŭ pli frue preparita scenaro.

La televida versio de *Mazi* estas dividita je 16 pecoj po kvin minutoj. La divido evidentiĝis tre malfacila, ĉar ĉiu peco devas havi logikajn komencojn kaj finojn. Samtempe oni devis dozi la grammatikan materialon en ĝustaj proporcioj, dum la intrigo altrudas sian propran distribuon de la grammatikaĵoj.

Louis C. Zaleski-Zamenhof kaj Marta en la studio de *Mazi*.



Gramatiko sur ekrano

La alilingvaj versioj de *Mazi* kiujn mi konas neniel zorgas pri regula instruado gramatika. Esperanto tamen, kiel logika sistemo, estas kvazaŭ speciale destinita por instruado perfilma. Ĉu eblas pli klare demonstri la funkciadon de la deriv-mekanismo ol per surekrane kungluiĝantaj morfemoj, ekzemple la sufikso kiu igas la Reĝon Reĝino?

Absoluta novaĵo de la televida versio estas la apero de Marta, 15-jara knabino, kiu demonstras la prononcadon. Tio ne eblas pere de la animitaj figuroj, desegnitaj cetere por la angla. Ŝi tamen aperas nur kelkfoje. Mi klopodis gardi la internan ekvilibron inter intrigo kaj gramatika aspekto. La spektanto ne rajtas senti ke li estas instruata. Ĉiukaze oni devas konscii ke la ĉefa tasko de ĉi tia kurso estas "nur" altiri la atenton de la homamasoj, krei favoran etoson por E-o, kaj doni ĝeneralan ideon pri la lingvo.

En la nuna epoko televidaj minutoj fariĝis multekosta varo. La neatendita starto de la kurso do surprizis nin ĉiujn. Tuj evidentiĝis ke nia movado ne pretas por alfronti tiom grandajn sukcesojn. Kurso direktita al milionoj postulas kongrue lanĉitajn amaskvantajn eldonaĵojn kaj multnombrajn instruistojn, kiuj tuj kaptu la kreskintan interesigon pri E-o. Ĉio ĉi provokas novajn taskojn por la E-organizaĵoj, kiuj en Pollando momente dronas en krizo.

Koincide vizitis Varsovion d-ro Louis C. Zaleski-Zamenhof. Li afable konsentis doni porokazan intervjuon, kiu aldoniĝis al la aventuroj de *Mazi*. Tio evidentiĝis tre grava, ĉar sekve oni decidis provizi per duminutaj ekzercoj ankaŭ ĉiujn aliajn filmpecojn.

La ĉefan decidon pri la elsendo faris Jadwiga Mazurek, direktorino de la Eduka Fakto. Pri la elsendoj mem respondecas redaktoro Dorota Rzepecka, kiu tiom entuziasmiĝis pro la Esperanta *Mazi* kaj la interparolo kun d-ro Zaleski-Zamenhof ke ŝi decidis mem projekti la aldonajn ekzercojn. Mi nur sugestis kaj kontrolas. Ĵus ni finis filmadon de scenoj en kiuj rolas Marta kiel juna instruistino kaj du lernantoj, sesjara Griĉjo kaj adoleska Wojtek.

La filmataj scenoj postulas altajn elspezojn, kiujn kovras Pola Televido: jen plua donaco al la movado.

Kio plu?

Ni kredu ke Pola Televido kreis precedencon. Kio eblas en Pollando, eblas ankaŭ aliloke. Oni povas celi ne nur tutlandajn televidstaciojn, sed ankaŭ lokajn kaj kablajn

televideojn. *Mazi* atinganta amasan tele-spektantaron estas nova defio por la movado. Kiel stiri la lernadon por ke la spektantoj efektive ekregu la lingvon? Kiel la movado ensorbu la homojn kiuj tiel ellernos E-on? Mi lasas ambaŭ demandojn sen respondo, kun la espero ke la legantoj aliĝos al la diskuto pri tiu gravega temo. Dume bonvolu skribi al: Telewizja Polska, Woronicza 17, PL 00-913 Warszawa, 5+10+15, *Mazi en Gondolando*.

Roman Dobrzyński (Pollando)

Cent jarojn post la lanĉo, kia teatro?

Adiaŭante la Jubilean Jaron de la Esperanta teatro, ni invitis kvar el ĝiaj bonaj konantoj doni sian opinion pri ĝia situacio. Marjorie Boulton kaj Georges Lagrange respondas al la ĉi-sekvaj demandoj; Bernard Golden kaj Julian Modest sendis kontinuan tekston.

(1) *Kia teatra kulturo povas ekzisti en komunumo dise loĝanta, kun malmultaj okazoj persone spekti prezenton?*

(2) *La Esperanta teatro neniam povis havi nur artan funkcion. Ĝi devis surprizi ankaŭ funkciojn socian (fortigo de komunumo-sento) kaj edukon (lingva klerigo). Ĉu sana situacio?*

(3) *Kia estas la arta nivelo de la Esperantlingvaj teatraj prezentoj?*

(4) *Ĉu la Esperantaj teatraĵoj kiuj (tamen) ekestas, vere taŭgas por esti ludataj? Aŭ ĉu ili pli taŭgas por lego?*

(5) *Kio plej mankas al nia teatro? Kio laŭ vi plej urĝe devus realiĝi?*

Foto: Simon Chapman



(1) Tre limigita, kompreneble; sed ni ne forgesu ke riĉa altnivela teatra kulturo — sursceneja — plejparte eblas por ĉiuj homoj nur en iom grandaj

urboj, kiuj povas subteni indan teatron kaj personaron. Tiurilate ni disaj esperantistoj dividas la sorton de la tutmonda homa plimulto de vilaĝanoj, kamparanoj, ĝangalanoj ktp. Sed se ni iam povos pli eniri la mondon de televido kaj vidbendoj, aperos nova situacio.

(2) Kvankam sociaj kaj edukaj funkcioj de la Esperanta teatro ja valoras, ili ne estas necesaj ecoj en ĉiuj Esperantaj dramoj. Eble, eĉ, tiuj funkcioj plej valore efikas kiam verkisto ne tro memevidente trudas ilin, sed ĉefe celas interesan artverkon originalan. Ni distingu inter skeĉoj kaj drametoj, verkitaĵoj por helpi lernantojn, stimuli grupojn k.s., kaj dramoj kun serioza arta intenco, pli aŭtentikaj partoj de nia vera literaturo. Certe ne estas sana situacio, en ies ajn kulturo, se la dramoj devas krude servi mallarĝan ideologion. Almenaŭ esperantistaj verkistoj kutime celas larĝigi toleremon kaj komprenemon, kaj ne inverse...

(3) En multaj Universalaj Kongresoj, kaj foje aliloke, mi vidis prezentojn kiuj ŝajnis al mi tute estimindaj, profesiecaj. Ofte la nivelo estas mirinde alta, kiam oni pripensas la problemojn, ekz. pri nekonata scenejo, malmultaj

ebloj por teama provludado, neatenitaj teknikaj malhelpoj ktp. Mi vidis multajn tre amatorecajn, preskaŭ ĝis fuŝajn, prezentojn en aliaj okazoj, sed plejparte sufiĉe agrablajn se konsideri la cirkonstancojn: saĝa homo atendas nur eblaĵojn. Prezentado dependas ne nur de la talentoj de geaktoroj kaj reĝisoro, sed de la ejo: ĉu oni havas veran scenejon, ĉu kurtenojn, lampojn, dekoraciajn rimedojn? plurajn eblojn por el- aŭ en-iri? Kaj ni ne forgesu ke la preparado de amatora prezenteto por simpatia aŭdantaro, eble por ia loka aranĝo aŭ kurso, ofte estas valora ekzerco, plurfake.

Ĉu ni povus pli utiligi sonbendojn (vere bone faritajn arte kaj teknike, kaj prefere kun presita teksto por konsultado) por havigi ian sperton pri Esperantaj dramoj al izolitaj grupoj kaj individuoj?

(4) Ĝis mi faris esplorojn por serio de prelegoj, mi tute ne sciis kiel riĉa estas nia jama dramaro. De pluraj jaroj nun mi volas finverki libron pri tiu temo, promesitan al la eldonejo Iltis; kiam ĝi aperos, ĝi surprizos multajn. Ni havas multajn verkojn apenaŭ valorajn arte; sed ni havas ankaŭ dramojn jam kompareblajn kun, mi diru, la dua grado de naciaj literaturoj. Sed nun granda parto de nia dramaro estas trovebla nur en bibliotekoj. Inter aŭtoroj vere estimindaj mi mencias: "Roksano" (Jeanne Flourens), Applebaum, Auld, Baghy, Bukar, Bulthuis, F. V. Dorno, Jan Filip, Privat, TABATA Kisaku, eble ankaŭ De Kock, Nervi, Emilija

Lapenna, "Julian Modest", Trygve Müller, R. Unterman? (Ofte la plej alta kvalito troviĝas en nur parto de verkaro.) Ĉi tiu listo nepre ne inkluzivas ĉiujn!

Ni jam havas elstare bonan antologion pri nia originala poezio, kaj duvoluman reprezentan antologion de niaj noveloj. Ĉu povus aperi, eble ĉe UEA, simila antologio de niaj plej bonaj dramoj? (Kaj ne, mi ne proponas min por redakti ĝin! Sed mi volonte iom helpus redaktoron.) Volumo de dramoj estas tre utila legmaterialo por kursoj kaj grupoj. Ho, kiel preskaŭ suferi mi sopiras havi trankvilon por fini mian libron rivelan pri nia drama riĉeco!



(5) Mi esperas ke iam aperos Esperantaj dramoj plenlongaj (triaktaj, kvinaktaj?) kaj de alta arta nivelo. Ni bezonas vere bonajn tragediojn, kiuj preskaŭ tute mankas. Ni ne forgesu pri filmoj, vidbendoj kaj sonbendoj. Estus bone havi proprajn operojn, komedioperojn, muzikdramojn. Sed temas pri genio, kaj tion oni ne povas mendii. Ni povas nur esperi.

Freŝaj, amuzaj, aktoreblaj skeĉoj kaj komedietoj unuaktaj estas ege utilaj, sialoke; sed ni ankaŭ aspiru al io pli grandskala kaj grandidea...

Povas esti ankaŭ kelkaj mankoj rilataj al legantoj kaj aŭdantaroj; sed tio estas ne literatura demando!

D-rino Marjorie Boulton (Britio)



(1) Mi vidas du kategoriojn de teatraĵoj prezentataj precipe dum la UK:

a) el la tiea nacia/etna kulturo:

– ne pro naciismo aŭ nacia kulto;


– nur por konigi la tiean kulturon, ĉefe se ĝi estas minoritata (finna, islanda ktp).

b) “grandaj verkoj” kun “universalaj temoj” (amo, potenc-avido, milito, konflikto inter kontraŭaj moralaj leĝoj ktp):

– tradukitaj el grandaj klasikuloj;

– prefere originalaj (sed kia nivelo?).

Bulgara E-Teatro ludas *Lanĉo de Emilija Lapenna*.



(2) Pro la daŭra *nematureco* de la E-komunumo (kiu procento de la e-istoj *normale* parolas? t.e. kiel la propran lingvon).

– La teatro daŭre havas rolon edukkan kaj lingvo-instruan: bedaŭrinde, sed neeviteble.

– Tia estis la rolo de la *Illustre Théâtre* de Moliero en la 17-a jarcento: diskonigi (trudi?) la francan lingvon, t.e. la lingvon de la reĝo kaj de la pariza burĝaro al la provincoj, kie oni pli-malpli komprenis ĝin sed apenaŭ parolis.

– Eble estas plia elemento por krei senton de aparteno al komuna kulturo. Sed ne tre solida cemento, ĉar tro sporada.

(3) Mi de longe ne spektis mem E-teatraĵojn. Sed plej ofte tio kion mi spektis estas neniel komparebla kun etnalingvaj prezentoj.

– La aktoroj devus perfekte regi la lingvon! Sen sentebla nacia akĉento (lingvomodelo!), por ke sursceneja akĉento estu signifhava (kaj ne manko de la aktoro!).

– Cetere la aktoroj estas plej ofte amatoroj kiuj provludas en terure malbonaj kondiĉoj.

(4) Ĉar mi estis plurajn jarojn en la ĵurio de la “arta konkurso” pri teatro, mi konfesas ke mi neniam atribuis unuan premion, maksimume duan. Laŭ la spertoj:

– Kiam oni trovas ion ludeblan – eĉ iom spritan –, temas pri komedietoj por klub-vesperoj.

– Tre ofte eĉ la lingvo-nivelo estas netolerebla aŭ teatre netaŭga (ne veraj dialogoj!).

– Nur dum provludo oni povas definitive fiksi la tekstojn.

– Du el miaj teatraĵoj estis premiitaj... sed neniu trupo provis ilin munti, kvankam almenaŭ unu (*Anton*) ne postulas grandajn rimedojn!

(5) La publiko, kompreneble!

– Ĉu oni povas evolui kaj plibonigi sian ludon se oni provludas dum monatoj por prezenti ion iom valoran kaj ludas... unu aŭ du fojojn? Ĉu miri ke la aktoroj senkuraĝiĝas?

– Ĉu ankaŭ ne malinstige estas ludi antaŭ publiko kiu ne reagis al la lingvaĵo, kiu ne ridas pro spritaĵo, ĉar ĝi nur duone komprenas?

– Ĉu filmi la teatraĵojn? Eble. Almenaŭ restus io kaj oni povus plibonigi, fajnigi la scenojn. Tio eble estus solvo, sed tio supozigas ankaŭ teĥnikan kompetenton. Ĉar la fuŝamatoreco (teatra kaj teĥnika) fiksita sur bendo estas ankoraŭ malpli tolerebla ol en simpla, unuopa prezento senpera.

– Oni povus prezenti teatraĵojn en la kluboj, eĉ en privataj hejmoj, montri hejme nian kulturon.

Georges Lagrange (Francio)

Legindaj, ludindaj

La amo de Danto Alighieri. Trygve Müller. Ascoli Piceno: Gabrielli, 1978. 115p. 20cm. Pri la amo inter Beatrice kaj Danto. 14,10 gld.

Andromaka. Jean Racine. Trad. G. Lagrange. Paris: UFE, 1988. 72p. 21cm. Klasika dramo inspirita de la helena mitologio. 8,10 gld.

Antaŭ la kulisoj. Bernard Golden. Budapest: HEA, 1994. 187p. 21cm. Dek du unuaktaĵoj. 18,00 gld.

Doktoro Braun vivas en ni. Julian Modest. Budapest: HEA, 1987. 71p. 20cm. Kvarscena dramo pri persona-publika agdilemo plus komedieto. 12,00 gld.

Eduko danĝera kaj aliaj teatraĵoj. Harold Brown. Högsby: Ulekso, 1995. 151p. 21cm. Dek teatraĵoj pri homoj “diverskaŭze apartigitaj” de la socio. 34,80 gld.

Facila skeĉ-albumo. Bertram Potts. Chapeco: Finto, 1984. 112p. 21cm. Cent mallongaj skeĉoj, taŭgaj por klasoj kaj klubvesperoj. 24,00 gld. *La fatomaŝino*. Ĵan Kokto'. Trad. G. Lagrange. Pizo: Edistudio, 1979. 125p. 21cm. Kvarakta dramo, iom parodia, pri la agoj kaj sorto de Edipo. 15,00 gld.

Fedra. Jean Racine. Trad. G. Lagrange. Paris: UFE, 1991. 76p. 21cm. Klasika versa dramo, pri helena temo. 9,90 gld.

La forpasinto / Edvardo kaj Agripina. René de Obaldia. Trad. G. Lagrange. Parizo: TESPA, 1984. 23p. 21cm. 6,00 gld.

Interkona mateno. Kvar teatraĵoj originalaj. Sten Johansson. Skövde: Al-fab-et-o, 1996. 52p. 21cm. 10,20 gld.

Invento de l' jarcento. Dramoj kaj komedioj. Julian Modest. Sofio: BEA, 1993. 79p. 20cm. Kvin verkoj. 6,00 gld.

Jozefo. J.D. Applebaum. La Laguna: J. Régulo, 1957. 120p. 22cm. Dramo kun biblia epizodo en heksametraj versoj. 9,00 gld.

La knabino estas mia. NZANIYE B. Jesse-Le-Prince. La aŭtoro, 1992. 52p. 21cm. La unua E-teatraĵo el Afriko. 5,10 gld. Daŭrigo: 1995. 55p. 7,20 gld.

Najbaroj kaj boroj. Stefan MacGill. Pisa: Edistudio, 1991 (2-a eld.). 216p. 21cm. Bind. Du teatraĵoj kun demandoj, ekzercoj kaj rol-ludoj. 27,00 gld.

Ni vivos! Julian Modest. Budapest: HEA, 1983. 53p. 20cm. Originale verkita dokumenta dramo pri la lastaj vivojaroj de Lidja Zamenhof. 8,10 gld. Kiel longdaŭra disko: 12,00 gld.

Pordoj. Stefan MacGill. Rotterdam: Stefeto, 1985. 84p. 21cm. Ilus. Dek unu skeĉoj. 8,10 gld.

Sonĝe sub pomarbo. Julio Baghy. La Laguna: J. Régulo, 1958. 221+4p. 22cm. Fantazia lirika dramo. 36,00 gld.

La turoj de l' ĉefurbo. Mauro Nervi. Manĉestro: Esperantaj Kajeroj, 1978. 119p. 21cm. Originalaj kanzonoj, noveloj, poemoj, teatraĵoj kaj eseo. 9,00 gld.

Virino ĉe la landlimo. Marjorie Boulton. Kopenhago: Koko, 1959. 196p. 21cm. Kolekto de drametoj kaj skeĉoj, seriozaj, lirikaj, amuz-satiraj. 9,90 gld.

Ĝustigo

La dato de la 53-a Internacia Junulara Kongreso (Asizo, Italio) aperis erare en la novembro “Kalendario” (p. 187): ĝi ja okazos ne en aŭgusto, sed inter la 24-a kaj 31-a de julio 1997.

Por eduki aktorojn kaj maturigi publikon



"Diablaj cirkloj"

Paul Gubbins, en sia artikolo "Kie estas la konsolo? Cent jaroj da E-dramo ... kaj la estonto" (Fonto, jan. 1996,

n-ro 181, p. 5-12), provas klarigi kial la ĝenroj de poezio kaj prozo daŭre floris dum la dramarto lamiĝis kaj stagnis. Por reliefigi sian vidpunkton, li imagas aron da diablaj cirkloj, ĉiu rilatanta al specifa kialo de bremsado de la teatra ĝenro, kiu ne evoluas samtakte kun aliaj kulturaj manifestiĝoj en Esperantujo, kaj li mem proponas kelkajn rimedojn por trarompi tiujn diablajn cirklojn. En tiu ĉi artikolo mi deziras pritrakti ankoraŭ unu elirvojon, kiu komenciĝas ekde la unua fazo de Esperanto-instruado en lernejoj.

Pedagogia valoro de aktorado

Fakuloj pri la psikologio de edukado kaj fremdlingva instrumetodiko emfazas ke lecionoj pri gramatiko kaj tradukado, postulantaj daŭran kaj streĉan atenton ĉe lernantoj, devas esti akompanataj de periodoj de ripozo kaj malstreĉiĝo, karakterizataj per ludado, kantado kaj ekzercado de diversaj korpopartoj — ne nur de la cerbo. Ĝuste tiun bezonon de instrua laboro plenumas ludado de roloj kaj de simplaj teatraj pecoj. La plej facila maniero transiri de la lernoĉambraj benkoj

al la imagplena mondo de la scenejo estas adapti legolibrajn rakontojn, se en tiuj troviĝas vigle agantaj rolantoj kaj spritaj dialogoj. Ĝis nun pritraktoj de tiu ĉi temo en metodikaj fakverkoj emfazas la didaktikan valoron de teatraĵoj en kursoj, cele al praktikado de la lingvo, sed estas akcentende ke tiu frua uzo de drama materialo povas servi ankaŭ por forigi du gravajn obstaklojn al la evoluo de la teatra ĝenro — mankon de trejnitaj aktorantoj kaj neekziston de kutimiĝintaj spektantoj.

Laŭŝtupe plani por evoluo

Post la spertoj kun parkerigo de dram-versioj de simplaj fabeloj, rakontoj kaj ankaŭ bildstrioj kiel ekzemple la Asteriks-serio, junaj aktorantoj estu kuraĝigitaj improvizi siajn proprajn skeĉojn sen antaŭpreparitaj tekstoj. Ĉe la tria ŝtupo, la plej ambiciaj lernantoj povas prepari unuaktajn teatraĵetojn, prefere komediojn, por prezentado antaŭ siaj samklasanoj. Sekvas gastprezentadoj en aliaj lernejoj kie Esperanto estas instruata, kaj, okaze de eksterlandaj vojaĝoj, en lernejoj de fremdaj urboj. Tiel formiĝas embrio de estonteca teatra publiko en la Esperanta komunumo. Por atingi la kvaran ŝtupon, la junaj lernejoj trupoj organizu ekster-lernejajn turneojn dum renkontiĝoj de esperantistaj familioj, en lokaj kluboj, landaj kongresoj kaj ankaŭ en la ĉiujara Internacia Infana Kongreseto.

Tamen iam...



Alvenis la centjara jubileo de la Esperanto-teatro, sed anstataŭ jubileaj mintrafas malgajaj pensoj.

La Esperanto-komunumo en

daŭro de cent jaroj ne sukcesis krei sian teatron, kiu devus riĉigi la Esperantan kulturon, preni sur sin funkciojn sociajn kaj edukajn, kaj eĉ instigi la evoluon de la parola lingvo.

Mi opinias ke neniu socio povas krei sian kulturon sen ekzisto de teatro. Dum pluraj jaroj mi okupiĝis pri la problemoj de la teatro kaj mi decidis dediĉi mian entuziasmon al la Esperanto-teatro — sed baldaŭ mi konvinkiĝis ke vera Esperanto-teatro simple ne estas.

Laŭ mia scio nun en la mondo ne ekzistas eĉ unu Esperanta teatra trupo kies celo estas vere flegi la E-teatron, surscenigi originalajn Esperanto-dramojn aŭ -komediojn, prezenti ilin antaŭ

Plua disvolviĝo de rilatoj inter trupoj kaj la publiko

Jam sperthavaj aktoroj povas organizi sin kiel trupojn kun la celo prezenti unuaktaĵojn ne nur distrajn sed ankaŭ literature valorajn kaj indajn por prezentado al plenkreskula publiko dum teatraj festivaloj kaj kiel programeroj de kongresoj. Stabildaj grupoj eĉ povas komisi al kompetentaj aŭtoroj verkadon de originalaj pecoj konvenaj al la talent-nivelo kaj specifaj interesoj de la membroj. Ĉi-speciaj organizitaj teatraj-prezentadoj povas doni vivon al memstaraj, longdaŭraj trupoj posedantaj repertuaron, prezent-stilon kaj propran teatran tradicion.

Tiel, per celkonscia, laŭŝtupa okupiĝo pri teatraj agadoj ekde la plej fruaj lernejoj jaroj ĝis plua spertiĝo dum la adoleska kaj universitata periodoj, lernantoj kaj uzantoj de Esperanto kutimiĝas al aktiva partoprenado. Tio samtempe havas la efikon krei, eduki kaj maturigi publikon pretan akcepti kaj subteni la dramon kiel kulturan valoradon de Esperanto.

Bernard Golden (Hungario)

Skulptistoj, ceramikistoj!

Pentras, skulptas, ceramikas aŭ ali-arte agadas multaj esperantistoj, sed ilia krea laboro ofte restas movade nekonata. Kulturagantoj kunvenantaj en la Praga UK pridiskutis tion kaj decidis "inventari" la esperantistajn artistojn, por eksciĝi kiun potencialon ni havas, ekz. por ekspozicioj dum UK-oj.

Katarina Eckstädt (Geschwister-Scholl-Str. 1, DE-63486 Bruchköbel, Germanio) deklaris sin preta kolekti la adresojn de la artistoj kiuj skulptas kaj ceramikas. Ĉiu kiu deziras kunlabori, sendu sian adreson kaj fotojn de siaj verkoj al ŝi. Se vi deziras respondon, bv. aldoni internacian respondkuponon.

Similan registran laboron pri pentristoj jam faras Marija Pozder Almada (Ave. Bernardino de Campos 624, apto. 72, BR-11065-002 Santos — SP, Brazilo).

e-istoj el diversaj landoj kaj tiamaniere kontribui al la evoluo de la E-teatro.

La Esperantaj teatroj kiuj ekzistis, estis tre malproksime de la celoj de la Esperanto-teatro. Eĉ nun mi tute ne povas kompreni kion celis la iama Bulgara Esperanto-Teatro (BET), kiu havis multjaran historion kaj estis bone konata. Tiu ĉi teatro konsistis el geaktoroj kiujn oni elektis tre atente laŭ politikaj kriterioj. Ilia ĉefa tasko estis parkerigi kiel papagoj tekstojn de konataj klasikaj dramoj kaj prezenti ilin dum la Universalaj Kongresoj en diversaj landoj. Tiuj ĉi geaktoroj kaj reĝisoroj neniam ellernis Esperanton kaj eĉ ne havis emon eklerni ĝin. Multaj el ili tute ne komprenis la idealojn de la esperantistoj kaj ofte primokis ilin. Por tiuj ĉi geaktoroj pli grave estis pere de Esperanto vojaĝi eksterlanden, ĉar antaŭ kelkaj jaroj ne estis facile eliri el Bulgario. Tial tute ne estis strange ke BET preskaŭ ne havis prezentojn en Bulgario.

La Esperantaj teatraj prezentoj dum la UK-oj, de BET kaj de similaj "Esperantaj" teatroj el Pollando, Hungario

kaj aliaj landoj, eĉ el Sovetio, tute ne kontribuis al la evoluo kaj riĉigo de la Esperanta kulturo. Ili ne sukcesis sugesti al la Esperanta publiko ke la rolo de la Esperanta teatro estas vere grava kaj respondeca, ke de la scenejo oni devas pritrakti problemojn aktualajn kaj gravajn por la Esperanto-komunumo. En la teatraj salonoj la publiko devus vidi momentojn el la historio de la Esperanto-movado, majstre interpretatajn de talentaj Esperanto-dramverkistoj. La publiko devus spekti antaŭ ĉio originalajn dramojn kiuj analizas aktualajn problemojn de nia socio.

Dum cent jaroj tamen, escepte de kelkaj okazoj, veraj Esperanto-teatraj prezentoj ne ekzistis. La reĝisoroj kiuj gastis en la Esperanto-teatro, preferis surscenigi konatajn verkojn — ne ĉiam tute bone elektitajn el la okcident-eŭropa literaturo —, ĉar por ili tio estis pli facila. Tiuj reĝisoroj tute ne interesiĝis pri la originala Esperanto-dramo kaj ne serĉis ĝin, nek pri ĝiaj aŭtoroj, kiuj tamen de longe pruvis sian talenton kaj kiuj ekzistas eĉ nun de Brazilo ĝis Japanio.

Tamen la Esperantaj dramverkistoj, kiuj malgraŭ ĉio daŭre verkas originale por la Esperanto-teatro, kredas ke iam eble aperos veraj Esperanto-trupoj, Esperantaj reĝisoroj, kiuj komprenos la gravecon de la Esperanto-teatro.

Julian Modest (Bulgario)

Kajeroj pri Esperanto-Teatro

Zofia Banet-Fornalowa. Mettmann: Alfred Conzeth, 1996 (3-a eldono). 88+36+108+40p. 21cm. *Skize pri Esperanto-teatro, Universalaj Kongresoj kaj Esperanto-teatro, Polaj aktoroj kaj Esperanto-teatro*. Kun la suplementa broŝuro *Intervjuoj, recenzoj, artikoloj*. 33,90 gld.

"...popular-science, precize kaj detale prezentita. Kiom da energio, sin-ofero, tempoperdo necesis por fin-pretigo de tiuj kajeroj — tion scias nur la aŭtorino..." (Emilija Lapenna)

INFORMADO

(daŭrigo de p. 201)

Kroatio: Plurkiale en televido

Kiel konate (nov., p. 184), traduko de kroata romano en la ĉinan unuafoje okazis pere de Esperanto. La represo de tiu libro, *Ano de l' ringludo*, staris en la centro de 20-minuta matena televidprogramo pri E-o, la 8-an de oktobro. Televida teamo vizitis la sidejon de Kroatia E-Ligo por intervjui pri E-o kiel lingvo punta al diversaj mondogrupoj, pri E-tradukado nuntempe, la ebla kandidatigo de Zagrebo por UK en 2000 ktp. En studio komentis Judita Rey-Hudeček kaj Spomenka Štimec. Rezulte de la elsendo 70 personoj telefonis por aliĝi al du novaj kursoj anoncitaj. (S. Štimec, *Tempo*)

Jam la trian jaron Kroatia E-ista Unuiĝo starigis informbudojn en la plej granda urbocentra magazeno, kie ĝi i.a. prezentis *Roma Meslibro* kaj *Mazi*, disdonis novan flugfolion pri E-o kaj KEU kaj aliajn informilojn. Tutlandaj gazetoj anoncis la aranĝon la antaŭan tagon. La 5-an matene la ŝtata radio faris telefonan intervjuon. Vizitis la

budon la ŝtata televido, kies vespera informprogramo emfazis la gravecon de E-o en internacia komunikado.

En Osijek e-istoj aranĝis ekspozicion en sia urbocentra vitrino. (M. Belošević)

Meksiko: Polica sperto

La Komitato de Meksika E-Federacio eldonis hispanlingvajn broŝuron kaj flugfolion pri Esperanto kaj MEF, distribuis ilin al ĵurnaloj kaj radiostacioj, kaj celis disdoni ilin ankaŭ dum la Ago-Tago en du tre frekventataj lokoj de Meksikurbo. Tamen, tio eblis nur dum kelkaj horoj kaj en alia loko, i.a. ĉar la urba polico malpermesis ĉiun surstratan kunvenon pro baldaŭ okazonta Nacia Indiĝena Kongreso. Laŭ tiu sperto MEF konkludis ke por sukcesa informado necesas plie atenti lokajn regulojn kaj morojn, kaj ĝi decidis lanĉi informkampanjon por 1997. (J. L. Gutiérrez)

Norvegio: Duobla koincido


La plej granda artikolo pri Esperanto en tutlanda norvega gazeto en almenaŭ

la lastaj 15 jaroj aperis hazarde en la Ago-Tago mem: raporto pri E-kurso de Atilio Orellana Rojas, kun granda bildo, okupis la duoblan mezan paĝon de la gazeto *Vårt Land*, unu el la 7 tutlandaj ĉiutagaj gazetoj en Norvegio. La saman tagon — plua koincido — du homoj de la ŝtata televido demandadis kaj filmis en la E-oficejo/klubejo en Oslo, por ilustru 10-minutan intervjuon kun la juna prezidanto de la E-grupo en Trondheim, Knut Lyngstad. Tiu dissendiĝis du tagojn poste, lunde vespere, kadre de junulara programo. Laŭ invito de la programestroj, multaj spektantoj sendis demandojn fakte aŭ retpoŝte. Lyngstad prezentis E-on kaj ties uz-eblojn lerte, alloge por gejunuloj. (D. Draper)

Serbio: Konvena integriro

La E-societo en Leskovac organizis en la urba muzeo la 8-an kaj la 9-an de okt. ekspozicion de esperantaĵoj kun prelegoj pri "Esperanto kiel la plej konvena ilo por integriro en la mondan kulturon". (R. Petrović) ★

Esperanto en radio



Internaciaj radioelsendoj en Esperanto (horoj laŭ UTC)

Ĉiutage			
Eŭropo	05:30-06:00*	Pola R. Varsovio	Sat (1)
Japanio, Koreio	11:00-11:27	Ĉina R. Internacia	6955, 948
Sudorienta Azio	13:00-13:27	Ĉina R. Internacia	11840, 1165
Eŭropo	14:30-15:00*	Pola R. Varsovio	7145, 7285, 9525, 6000, Sat (1)
Eŭropo	19:00-19:30*	Pola R. Varsovio	6035, Sat (1)
Eŭropo	19:25-19:30*	Pola R. Vars. / WRN	Sat (2)
Eŭropo	20:00-20:27	Ĉina R. Internacia	7405, 9965
Eŭropo	21:30-21:55*	Pola R. Varsovio	7270, 6035, 6095
Latin-Ameriko	22:30-22:57	Ĉina R. Internacia	9480, 11500, 6950
Nur dimanĉe			
Eŭropo	04:30-04:57*	R. Aŭstria Internacia	6155, Sat (3)
Pacifika Azio, Nord-Ameriko	07:00-07:30	R. Havano Kubo	9820
Eŭropo, Orienta Azio	12:30-12:57*	R. Aŭstria Internacia	6155, 15450, Sat (3)
Amerikoj, Karibio	15:00-15:30	R. Havano Kubo	11760
Eŭropo, Mediteraneo	19:30-20:00	R. Havano Kubo	13715
Eŭropo, Amerikoj	20:20-20:30*	R. Vatikana	527, 1530, 5882, 4005, Sat (4), Sat (5)
Eŭropo, Mediteraneo	22:00-22:30	R. Havano Kubo	13715
Amerikoj, Karibio	23:30-24:00	R. Havano Kubo	11760, 11875, 6070
Dum aliaj tagoj			
lunde: Sud-Ameriko	01:30-01:57	R. Aŭstria Internacia**	9870, 9495
lunde: Nord-Ameriko	01:30-01:57	R. Aŭstria Internacia**	7325
marde: Eŭropo	20:30-20:45*	Estonia R.	5925
merkrede: Eŭropo, Azio, Afriko	20:20-20:35*	R. Vatikana	1611, 6185, Sat (6)
sabate: Eŭropo	20:00-20:20	RAI Internacia	9670, 11905

*ekde 30 marto 1997 unu horon pli frue laŭ UTC (ĉar konstanta laŭ Meza Eŭropa Tempo)

**La du elsendoj el Vieno al Amerikoj estas riceveblaj fakte, laŭ loka horo, dimanĉe, posttagmeze aŭ vespere.

Satelitaj indikoj konsistas el 3 partoj: nomo de la satelito kaj ties pozicio; frekvenco kaj polarizado (+ nomo de la televid-kanalo); frekvenco de la aŭda subportanto.

(1) Eutelsat II F6 13 E (Hot Bird), 11.476 GHz Hpol (TVPolonia), 7.38 MHz [Eŭropo]

(2) Astra 19.2 E, 11.538 GHz Vpol (VH1), 7.38 MHz (World Radio Network 1 Europe, 4-minuta reelsendo de la posttagmeza programo de Pola Radio; disaŭdigata tra multaj urbaj kablo-retoj)

(3) Astra 19.2 E, 11.141 GHz Hpol (BFS 3), 8.10 MHz, per Astra Digiata Radio (ADR) [Eŭropo]

(4) Eutelsat II F1 13 E, 10.987 GHz Vpol (NBC), 7.38 MHz [Eŭropo]

(5) Intelsat 603: 34.5 W, 4097.75 MHz LHCP, aŭda kanalo A-1 [Atlantiko, Amerikoj]

(6) Intelsat 704: 66 E, 4152.45 MHz RHCP, aŭda kanalo I-1 [Azio, Afriko]

fonto: OSIEK-AERA, Amikaro de Esperanto en Radio
<<http://www.worldnet.net/~bmasala/AERA>>

Esperanto, radio kaj TTT

Hejmoj en la Tut-Tera Teksaĵo

Jam pluraj Esperanto-redakcioj havas paĝo(j)n en TTT kaj tiel informas pri siaj programoj, iniciatoj, frekvencoj ktp. Pola Radio hejmas ĉe kolego PEJNO Simono, kiu konstruis ĝiajn belajn E-lingvajn paĝojn: tie legeblas kaj elŝuteblas multaj tekstoj de la elsendoj kaj praktikaj informoj. Polskie Radio S.A. mem disponigas paĝojn pollingvajn pri sia programo por eksterlando, kun ligo al la Esperantaj. Cetere, pluraj lokaj stacioj ĉeestas: en Västerås, Svedio, E-lingva paĝo priskribas la enhavon de la programoj; la tri Tuluzaj stacioj oficiale prezentas ĉiujn siajn programojn, franclingve.

Ni invitas vin viziti:

- PolaRadio: <<http://ourworld.compuserve.com/homepages/simono/polrad.htm>>
- Narradio Västerås: <<http://www.quicknet.se/ftp/dialup/q-111060/radioe.htm>>
- Radio FMR: <<http://www.starnet.unisoft.fr/fmr/pgespera.html>>
- Radio Okcitanio: <<http://www-sv.cict.fr/radio-occitania/emiss/esperant.htm>>
- Radio Kanalsud: <<http://www.worldnet.fr/~canalsud/esperanto.html>>

Sondokumentoj per TTT: jam riceveblas pluraj radio-programoj

Ekde oktobro 1996, OSIEK disponigas en la Tut-Tera Teksaĵo registritajn radio-elsendojn, kun permeso de la koncernaj stacioj. Ĉio pri la maniero aŭskulti ilin aperas en specifa TTT-paĝo de OSIEK-AERA. Nuntempe haveblas ĉirkaŭ 45 minutoj da programoj, el Varsovio, Pekino (tra Pola Radio), Vatikano kaj Kubo. Tio estas pli ol 2,5 megabajtoj: aliaj programoj atendas liberan lokon. Pro tio se vi, kara leganto, posedas liberan senpagan lokon en TTT-maŝino (ĉe via universitato aŭ aldone al via Interret-abono), vi povus krei hejmon por kelkaj sondokumentoj: bonvolu informi la kunordiganton <bmasala@worldnet.net>.

Aŭskultu kaj raportu al la stacioj mem pri la enhavo de la programoj. Ĉiuj paĝoj, sondokumentoj, adresoj atingeblaj de: <<http://www.worldnet.net/~bmasala/AERA/>>.

Bruno Masala

Kunordiganto de OSIEK-AERA

✉ bmasala@worldnet.net

Adresoj

Internaciaj stacioj

Pola Radio – Esperanto
Skrytka 46, PL-00 977 WARSZAWA,
Pollando
☎ [48](22) 645-5917 aŭ -5919
✉ pettyn@radio.com.pl

Ĉina Radio Internacia – Esperanto
CN-100866 BEIJING, Ĉinio
☎ [86] (10) 851-1428 aŭ -3175

Radio Aŭstria Internacia – Esperanto
AT-1136 WIEN, Aŭstrio
☎ [43] (1) 87878-3630 aŭ -4404
✉ info@rai.ping.at (ROI-Esperanto)

Radio Havano Kubo – Esperanto
P.F. 6240, LA HABANA, Kubo
☎ [53] (7) 338729
✉ radiohc@tinored.cu (RHC-Esperanto)
telekso: 51 1344 rhc cu

Radio Vatikana – Esperanto
VA-00120 CITTÀ DEL VATICANO
☎ [39] (6) 63 2839
✉ mc6778@mcmlink.it (RV-Esperanto)

RAI Internacia – Esperanto
C.P. 320 Centro Corr., IT-00187
ROMA, Italio
☎ [39] (6) 331 71 895

Estona Radio – Esperanto
Gonsiori tn 21, EE-0100 TALLINN,
Estonio
☎ [372](2) 434 139

Kelkaj lokaj stacioj

Radio Kanalsud' – Esperanto
40 rue A. Dumeril, FR-31400
TOULOUSE, Francio
☎ [33] (0)5 61 25 95 43
✉ canalsud@worldnet.fr (Floréal
MARTORELL)

Radio Radicale – Esperanto
Via Principe Amedeo 2, IT-00185
ROMA, Italio
☎ [39] (6) 68805396
✉ e.r.a@agora.stm.it (Radio Rad)

Narradio Vasteras – Esperanto
ABF, SE-72103 VÅSTERÅS, Svedio
☎ [46] (21) 1335 29
✉ wimp@quicknet.se (Radio)

Radio FMR – Esperanto
BP 2435, FR-31085 TOULOUSE
Cedex, Francio
✉ fmr891@mail.starway.tm.fr (Floréal
MARTORELL)

Radio Okcitanio – Esperanto
60 rue Assalit, FR-31500
TOULOUSE, Francio
☎ [33] (0)5 62 16 22 14
✉ ocradio@cict.fr (Rikardo CASH)

MUZIKO

Esperanto-disko sonas tutmonde

De novembro Esperanto ĉiutage aŭdiĝas en muzik-radioj de tuta Hispanio — pere de disko titolata *Esperanto*, kiun eldonis Warner Music Spain. En januaro ĝi estos lanĉita tutmonde.

Lastan februaron vizitis Hispanan E-Federacion (HEF) konata komponisto-produktisto hispana, kies disko *Angelis* (1995), kantita de infankorusoj latine kaj angle, furoris plurlande kaj vendiĝis sole en Hispanio en 250 mil ekzempleroj. Li petis helpojn por sia nova projekto: disko kantota de diverslandaj korusoj en Esperanto kaj la angla. Simpatianto sed neparolanto de Esperanto, li intencis mem verki la tekstojn. Nur pri korektado kaj prononcado li volis helpojn, kaj por tio li ofertis pagojn al HEF.

Ni akceptis kaj post kelka tempo estis invititaj en sonstudion por aŭdi la du unuajn kantojn. La tekstoj havis erarojn kaj la prononcado ne estis bona, sed ĝenerale la afero ŝajnis esperdona. La komponisto promesis ke ni povos trakorekti ĉion tuj kiam ĉiuj kantoj estos finitaj.

Efektive, fine de julio li telefonis por peti nian urĝan helpojn. Ĉiuj kantoj pretis. Li intertempe eĉ konvinkis la kompanion ke la disko estu nur en Esperanto, sen la angla. La tekstoj estis nun relative bonaj. Ni helpis adapti la tekstojn al la muziko — tre pena tasko, ĉar li neniel akceptis verajn ŝanĝojn. Ni faris en la studio nian plejan eblon en tre streĉita etoso, dum du vesperoj-noktoj. Oni registris modelan kantadon por la profesiaj korusoj kiuj kunlaboros laŭplane i.a. en Sofio kaj Moskvo. Ni proponis ke kompetentaj surlokaj esperantistoj konsilu dum la registradoj. Tio estis entuziasme akceptita, kaj oni petis nin tuj aranĝi kontaktojn. Simile pri la angligo de ĉiuj tekstoj: laŭ nia invito Martyn McClelland, de Brita E-Asocio, tradukis la tekstojn.

Ankaŭ la aliaj E-asocioj kontaktitaj reagis rapide kaj kunlaboreme: en Sofio helpis Kiril Popov kaj Petăr Todorov, fine de aŭgusto; en Moskvo Nikolao Gudskov kaj Oksana Zvereva, meze de septembro. La registra

skipo ambaŭkaze revenis Madriden tre kontenta pri la kompetenta helpo de lokaj esperantistoj.

Per tio nia kunlaboro ŝajne finiĝis. Laste oni petis nin ankoraŭ ne paroli pri la afero, ĝis la tutmonda lanĉo de la disko antaŭ Kristnasko. Sed subite, la 16-an de novembro, telefonis amiko: li ĵus aŭdis en radio kanton el la atendata disko, kun tre favora komento de parolisto. Unu tagon poste li senprobleme aĉetis la diskon en muzikvendejo! Iom elrevigis nin ke ĝi aperis sen averto al ni. Ĉiel ajn, gravas ke ĝi jam disponeblas en Hispanio, kaj ekde januaro estos vendita en aliaj landoj.

La kajero akompananta la diskon enhavas la originalajn tekstojn en E-o kaj tradukojn al la angla, franca, germana, hispana, itala kaj japana. La muziko estas tute sintezila, moderna adapto kaj reverko de klasikaj pecoj. La eldon-kompanio dissendis kun la disko, al siaj diverslandaj filioj kaj amaskomunikiloj, tekston en Esperanto kaj aliaj lingvoj, kiu i.a. diras ke E-on “parolas ĉirkaŭ miliono da homoj” kaj ke “multaj poetoj, verkistoj kaj artistoj uzas ĝin kiel vehiklon por sia kreivo”.

Nun ni helpu sukcesigi la diskon, por ke ĝi helpu sukcesigi nin. Necesas ne nur aĉeti, sed ree kaj ree peti la diskon *Esperanto* en vendejoj kaj de radiostacioj. Esperanto-asocioj faksu al radioj bonajn sed koncizajn informojn pri nia lingvo; tiel la komentoj de la radioparolistoj estos pli informhavaj (jam okazas en Hispanio ke oni prezentas en radio la kantojn kun sinteno favora al Esperanto sed kun tipaj antaŭjuĝoj aŭ neĝustaj esprimoj); certe atingeblos multaj intervjuoj kaj artikoloj. Per ĉi tiu disko multegaj homoj aŭdos unuafoje pri Esperanto kaj Esperanton — je kvalito, medio kaj vasteco ĝis nun nealireblaj al nia movado.

Marcos Cruz

Hispana Esperanto-Federacio



82-a

UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Adelajdo (Aŭstralio), 19-26 julio 1997

Adresoj

LKK: p/a Max Wearing, 30 Westbury Street, Hackney SA 5069, Aŭstralio.

Konstanta adreso: 82-a UK, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Glumarko, afiŝo

La trikolora glumarko de la 82-a UK (vd. la dorskovrilon) estas ideala ornamaĵo por leteroj kaj kartoj kun bondeziroj por 1997, la jaro de Adelajdo. Kolora afiŝo A3-formata estas mendebla ĉe la CO kontraŭ 1,60 gld. (= 1 respondkupono).

Kongresa temo

La temo "Toleremo kaj justeco en multkultura mondo" kongruas kun la landa fono de nia kongreso, nacio kiun kunformas (laŭ freŝa esploro) 244 etnoj. Tamen la temo koncernas la tutan hodiaŭan mondon, kiu ankoraŭ ne trovis taŭgajn respondojn al la ĉi-epoka defio de multkultureco.

Unua kaj Dua Bultenoj

Kolora, riĉe ilustrita Unua Bulteno estas senpage havebla ĉe la kongresaj perantoj kaj ĉe la CO. La abunde ilustrita Dua Bulteno kun detala oferto de flugoj, loĝ-ebloj, ekskursoj, antaŭkaj postkongresoj, informoj pri la kongresa programo kaj aliaj utilaj detaloj aperos kaj dissendiĝos al ĉiuj aliĝintoj en januaro.

Flugoj

Dank' al speciala aranĝo kun la nacia flugkompanio Qantas, UEA povos oferti kontraŭ allogaj tarifoj flugojn el grandaj flughavenoj en preskaŭ ĉiuj mondopartoj, i.a. ĉirkaŭmondan flugon. Petu detalan oferton.

Loĝado

LKK rezervis lokojn en praktike ĉiuj loĝkategorioj: de luksaj hoteloj kontraŭ moderaj prezoj ĝis relative komforta amasloĝejo. Speciale favoraj estas la prezoj de 4- kaj 3-stelaj hoteloj kiuj najbaras la Kongresejon. Tre avantaĝaj estas lokoj en unulitaj ĉambroj de studenta domo, kun pli da komforto ol kutime en tia loĝkategorio. Detalaj informoj aperos en la Dua Bulteno.

Ekskursoj

La gamo de ekskursoj estos vere vasta: duontagaj, tuttagaj, vesperaj, du-kaj tritagaj ekskursoj ebligas konatiĝon kun ĉiuj anguloj de la fascina urbo kaj kun la proksimaj vidindaĵoj. Apud pluraj traurbaj ekskursoj, kiuj montros diversajn facetojn de la urba vivo (botaniko kaj zoologio, historio, arto, nokta vivo, butikoj), elstaras la ekskursoj al la ĉirkaŭaĵo, abunda je vitejoj kaj keloj de jam monde famaj vinspecoj. Ne malpli allogaj vizitceloj estas la ekologia miraklo de Warrawong; la laguno Coorong, grava por la aborigena historio kaj natura vivejo de multaj birdospecoj; monteto de Adelajdo; observado de balenoj, vizitoj al montoj kaj sovaĝejoj ktp, sed antaŭ ĉio ravos la memorinda Kangurua Insulo.

Antaŭkongreso

"La plejoj de Aŭstralio" celas dum 5 tagoj montri la absolute vidindajn lokojn de Aŭstralio: Cairns, Sidnejon, la famegan rokon Ayers aŭ Uluru (la plej grandan solstaran rokon en la mondo, kies bildo ornamas ĉi tiun komunikon), Alice Springs, kun vojaĝo al Adelajdo per la Ghan-trajno, kiu estas fenomeno en si mem. Ĝi estas

altklasa aranĝo, kun pluraj internaj flugoj kaj restado en luksaj hoteloj kun unuaklasa servo.

Aliaj antaŭkongresaj ekskurs-ebloj — de du- ĝis kvintagaj — celos la tropikan zonon ĉirkaŭ Darwin, la Rifajn Insulojn kaj la pluvbarojn.

Postkongresoj

La oficiala postkongreso vizitos Nov-Zelandon, de la 29-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto. Ĝi komenciĝos en Aŭklando, atingota fluge, kie oni havos unikan Antarktan travivaĵon. Poste oni vizitos la lokon Rotorua por renkontiĝi kun la maoria kulturo, sed ankaŭ por admiri naturojn: termofontojn, vulkanojn, salikok-farmojn kaj elektrejan lagon. Viziton al Vaitomo oni profitos ankaŭ por vidi kalkajn grotojn kaj sperti boatadon laŭ subtera rivero. La lastan tagon oni uzos por pli detale esplori Aŭklandon mem kaj ĝian regionon.

Aliĝoj

Ĝis la mezo de novembro aliĝis ĉ. 650 kongresanoj el 53 landoj, kio aŭguras bone vizitotan ekstereŭropan kongreson. Aliĝis pli ol po 100 aŭstralianoj kaj japanoj; elstaras laŭnombro francoj, germanoj, italoj, britoj kaj nederlandanoj.

Kotizoj

Ĝis la jarfino validas jena tarifo: individua membro de UEA (IM) 270 guldenoj (nepagipovaj landoj: 202 gld.); ne-IM — 338 (252); junulo, kunulo, komitatano, handikapito mem IM 135 (101), ne-IM 202 (151). Ekde la 1-a de januaro la kotizoj estos respektive 324 (242), 402 (302), 162 (121) kaj 242 (182) gld. ★

ALIĜILO

ADELAJDO

Konstanta adreso: 82-a UK de Esperanto

Nieuwe Binnenweg 176

3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Adreso de LKK: Libroservo de Aŭstralia E-Asocio

p/a s-ro T. Elliott, P.O. Box 230

2036 Matraville N.S.W., Aŭstralio



**82-a UNIVERSALA
KONGRESO
DE ESPERANTO
19-26 julio 1997
Adelajdo, Aŭstralio**

Kongresa numero:

ĈIU ALIĜANTO UZU APARTAN ALIĜILON, FOTOKOPION AŬ SAMFORMATAN PAPERON – BONVOLU
TAJPI AŬ SKRIBI PRESLITERE. LAŬBEZONE METU KRUCON EN LA KONCERNAJN KVADRATETOJN.

FAMILIA NOMO **VIRO/VIRINO**
(por alfabeto ordigo) (forstreku unu)

PERSONA(J) NOMO(J) **UEA-KODO** _____ - _____

ADRESO (nacilingve en latinaj literoj kun poŝtkodo)

LANDO **TEL. N-RO** (kun prefikso)

PROFESIO / FAKO

ŜATOKUPO **NASKIĜDATO**

Mi aliĝas al la Kongreso laŭ la kondiĉoj presitaj sur la dorsa flanko;

☐ mi sendas ĉi tiun aliĝilon al mia landa peranto kaj samtempe pagas al tiu.

☐ mi sendas ĉi tiun aliĝilon al la CO en Roterdamo kaj pagas laŭ suba specifo:

☐ al ABN-Amro-konto n-ro 42.69.01.444 en la nomo de la UK (aldonante 15 gld.).

☐ al ĝiro-konto n-ro 627337 Den Haag (aldonante 15 gld.; por nederlandanoj sen kostoj).

☐ per eŭroĉeko/poŝtmandato al la adreso de la UK en Roterdamo.

☐ per ĉeko favore al UK de Esperanto (aldonante 21 gld.).

☐ per Visa/Amex/Mastercard n-ro valida ĝis

☐ al la poŝtekkonto de UEA en (Belgio 000-1631831-97;
Germanio 3182 91 509 BLZ 370 100 50 Köln; Svedio 74374-0; Svislando 12-2310-0 Genève).

☐ el mia UEA-konto, kie estas sufiĉa kredito (bonvolu debeti tie).

Mi legis, komprenas kaj akceptas la kondiĉojn presitajn dorsflanke sur ĉi tiu aliĝilo.

DATO **SUBSKRIBO**

Por uzo de la administracio / peranto:		KOTIZO (vidu dorse)
uea-membro en kategorio/faro		BLINDULA KASO
spezfolio n-ro:		DONACO AL KONGRESO
konfirmo de peranto:		FONDAĴO CANUTO
PAGO EN CO	KONFIRMO	INFANA KONGRESETO
		TRIAMONDA FONDAĴO
		VOLONTULA FONDAĴO
notoj		KOSTOJ (15/21 gld.)
		ENTUTE (en guldenoj)

Se vi aliĝas kiel kunulo, bv. ĉi tie indiki la nomon/kodon de la ĉefaliĝinto:

Se vi aliĝas kiel handicapulo, ĉu UEA jam havas atestilon? jes / mi kunsendas (forstreku unu)

Se vi aliĝas senpage, bv. skribi ĉi tie la kialon (vidu dorse):

La kotizoj varias depende de la loĝlando de la aliĝanto, laŭ la jena grupigo:

A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj menciitaj ĉi-sekve sub B;

B: Iamaj socialismaj landoj de orienta Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.), Afriko kaj Latina Ameriko.

La kotizoj estas pagendaj al la konstanta adreso aŭ al landa peranto (vidu liston en la Unua Bulteno). La CO en Roterdamo akceptas aliĝilojn ĝis la 15-a de junio 1997.

POR ELEKTI LA ĜUSTAN KOTIZON BV. ATENTE LEGI LA ĈI-PAGAĴN KLARIGOJN.

KONGRESKOTIZOJ VALIDAJ: (ĉiuj en nederlandaj guldenoj)	ĝis 96 09 30 1-a periodo		ĝis 96 12 31 2-a periodo		ĝis 97 03 31 3-a periodo		ekde 97 04 01 4-a periodo	
Aliĝkategorio	A	B	A	B	A	B	A	B
1. ne individua membro de UEA	270	202	338	252	402	302	475	360
2. individua membro de UEA (ne inkluzivas MG):	215	162	270	202	324	242	380	285
3. kunulo / junulo / handikapulo, ne individua membro de UEA:	162	121	202	151	242	182	285	212
4. komitatano/kunulo/junulo/handikapulo, mem individua membro de UEA	107	81	135	101	162	121	190	142

DIFINOJ

Individua membro de UEA: Dumviva Membro (DM), Membro kun Jarlibro (MJ aŭ MJ-T), Membro-Abonanto (MA aŭ MA-T). *Ne temas pri Aligitaj Membroj kaj ne inkluzivas Membrojn kun Gvidlibro (MG).*

Komitatano: Tiu, kiu estas membro aŭ observanto en la Komitato de UEA.

Kunulo: Tiu, kiu loĝas samadrese kun la ĉefaliĝinto. Ĉefaliĝinto oni konsideras personon kiu pagas kotizon en kategorio 1 aŭ 2.

Junulo: Tiu, kiu naskiĝis inter 67 01 01 kaj 76 12 31 (inkluzive). Oni nepre notu la naskiĝdaton sur la aliĝilo.

Handikapulo: Tiu, kies handikapo postulas akompananton, kaj kiu pruvis tion per kuracista aŭ simila atestilo.

Senpage aliĝas:

- infanoj kaj gejunuloj naskiĝintaj post 76 12 31;
- nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj.

La kotizo ne estas repagebla, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la Kongreso ne okazas, aŭ okazas en alia urbo.

La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn, bankedon kaj eventuale aliajn aparte pagendajn aferojn pri kiuj informoj kaj mendiloj aperas en la Dua Bulteno. La kotizo inkluzivas nenian asekuron.

Kongresaneco ne estas transdonebla al alia persono.

Por la limdatoj kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de ricevo de la pago en la CO aŭ ĉe peranto. Aliĝilon sen kompleta pago oni ne traktos.

Kongresa Regularo (ekstrakto): “8. Kongresanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Kongresan Regularon, aŭ malutilas al la UK, kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas la UK.”

Kiu subskribas ĉi tiun aliĝilon, konfirmas sian respekton por la Kongresa Regularo kaj la laŭstatuta neŭtraleco de UEA, kiu organizas kaj aŭspicias la Universalajn Kongresojn.

**Se vi pagas al peranto, bonvolu sendi ankaŭ la aliĝilon al tiu.
Se vi pagas rekte al konto de UEA, sendu la aliĝilon al Roterdamo.**

Baltio: faroj malgraŭ baroj

Dum naŭmonata ofica restado en la estona ĉefurbo Tallinn, Andy Künzli kontaktis e-istojn en Estonio, Latvio kaj Litovio. Jen kelkaj liaj impresoj, kaj faktoj, pri la baltaj movadoj.

Estonio: Ne furore sed estimate

La gesamideanoj en Tallinn formas la kernon de la estona Esperanto-movado. Plejparte maljuna, simpatia dudeko-trideko kunvenas ĉiusemajne en la prestiĝa Instruista Domo ĉe la urbodoma placo. La klubo disponas konsultindan bibliotekon kaj libro-servon. Kiel en sovetaĵaj tempoj, ankaŭ nun okazaj eksterlandaj gastoj spertas apartan atentemon de la estonaj klubanoj. Grave: la Esperantaj tranoktebtoj en Tallinn estas limigitaj, do vizitonto okupiĝu pri tiu demando sufiĉe frue.

La estona Esperanto-movado iam eble pli "furoris" ol nun. Sed ĝi restas sufiĉe konata kaj estimata ĉe la informita publiko, precipe pro la fervora apogo de iamaj kaj nunaj eminentuloj — Hilda Dresen, Ferdinand Eisen, Paul Ariste. Interkrampe, en Tallinn oni trovas la tombon de la eksesperantisto, unua tradukinto (1896) de *Princino Mary* de Lermontov [vd. p. 214] kaj lanĉinto de la lingvo Occidental-Interlingue: Edgar von Wahl (1867-1948). Konataj nuntempaj planlingvistoj en Estonio nomiĝas Aleksandr Duliĉenko, internacie respektata slavisto kaj universitata profesoro en Tartu, aŭtoro de gravaj interlingvistikaj verkoj, kaj Madis Linnamägi, populara lingvo-instruisto kaj prezidanto de Tartua Esperanto-Societo. En Tallinn elstaras Ahto Kaljusaar, ĉefredaktoro de la distrikta gazeto *Harjuma*, prezidanto de Esperanto-Asocio de Estonio (EAE) kaj redaktoro de la E-programo de Estona Radio. Unu el la spiritaj patroj de la estona movado, pioniro Jaan Ojalo en Tallinn, malgraŭ alta aĝo daŭre delegitas por UEA, kaj liaj valoraj historiaj studoj aperadas en la lerte redaktataj *Informoj de EAE*. Lia historio de la estona E-movado baldaŭ aperos en la festlibro por Reinhard Haupenthal. En la hejma arkivo de Ojalo gravaj vortaraj kaj enciklopediaj materialoj atendas publikiĝon — eble vane pro manko de teknikaj kaj financaj rimedoj. Do,

multflanka subteno estas bezonata. Tio same validas por konservi la Esperanto-elsendojn ĉe Estona Radio, kiuj en 1993 estis minacataj de malapero. Ŝajnas miraklo ke oni decidis daŭrigi la Esperantajn disaŭdigojn — cetere malfavore al la svedlingva programo.

Latvio: Gastamo en izolo

Kiel en aliaj postkomunismaj landoj, ankaŭ en Baltio la nova, politike nestabila situacio kaj kompleksa ekonomia realo kaŭzis ke la E-movadoj iom izoliĝis kaj grandparte dependas de si mem. E-istoj el aliaj ekssovetaĵaj respublikoj mankas en aranĝoj de la baltaj landoj, nun kvazaŭ neatingeblaj pro la ŝtatlimaj baroj kaj la altaj vojaĝkostoj. Bone ke la 80-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Finnlando: ne malgrandaj grupoj de estonaj, latvaj kaj litovaj e-istoj vojaĝis transmaren al la norda najbarego. Inverse, post Tampere, eksterlandaj kongresanoj iom grandnombre postkongresis en Estonio kaj vojaĝis tra Baltio.

Trovi kontakton kun la tre gastamaj kaj helpemaj e-istoj en Latvio facile eblas tra UEA-delegitoj, Pasporta Servo kaj Amikeca Reto de SAT (vd. p. 215). Krom en la ĉefurbo Rigo, Esperanto-kluboj funkcias ankaŭ en Liepāja kaj Cēsis. Latvia Esperanto-Asocio estas prezidata de Māris Jākobsons, renoma funkciulo ĉe la Agrikultura Ministerio en Rigo. Li ankaŭ redaktas la informilon *Latvia Esperantisto*. Pri la historio de la latva movado okupiĝas Saulcerite Neilande kaj Alida Zigmunde. La UEA-delegitoj Jānis Dzelve (en Priekuļi), Aristīds Mediņš kaj Zigfrīds Polāks (en Rigo) organizas la lokan turismon. En somero 1996 okazis la Balta E-Tendaro en Jūrmala; por 1997 ĝi estas planata en Haapsalu, Estonio.

Litovio: Tradicia forto

En Litovio, la E-movado koncentriĝas en Kaunas. Aliaj E-ĉeloj ekzistas en Vilnius, Klaipėda, Panevežys, Šiauliai, Marijampolė kaj Pazvalys. En Kaunas la renovigita Esperanto-domo servas kiel sidejo de Litova E-Asocio (LEA) kaj kiel E-centro (kun libro-servo kaj riĉa biblioteko), kie kunvenas pluraj urbaj kluboj. Krom tio, la turisma oficejo "Bonvoje" instaliĝis ĉe strato Zamenhofo 5, kie iam vivis la familio Zilbernik, boparencoj de L.L. Zamenhof. La funkciadon de la domo — kaj esence ankaŭ de la litova movado — garantias du centraj aktivuloj: Povilas Jegorovas, prezidanto de LEA, estrarano de UEA, profesie advokato en sia urbo; kaj Petras Čeliāuskas, tre kompetenta redaktoro de la revuo *Litova Stelo*. Altaj financaj investoj de LEA, kiuj kondukas ĝin al la rando de monelĉerpiĝo, vivtenu kaj akcelu la litovan movadon: tiel, centoj da homoj lastatempe finis bazan kurson pri Esperanto gviditan de la importita brazilano Aristóphio A. Alves Filho. Fakte, la eksterlandan vizitanton ĉiam impresis la "armeeto" da litovaj krokodiloj. Sensacia propagando do ne mankas: alia brila ekzemplo estis antaŭ nelonge la aŭdienco de la prezidanto de UEA, LEE Chong-Yeong, ĉe Algirdas Brazauskas, siavice prezidanto de la Litova Respubliko (vd. maj., p. 82). Ankaŭ aranĝita de Jegorovas!

Ĉiuj tri prezidantoj de la E-asocioj en Estonio, Latvio kaj Litovio konkludas optimisme, sed volas esti realismaj pri la stato de sia organizo. Mi persone esperas kaj deziras ke sinjoroj Kaljusaar, Jākobsons kaj Jegorovas ankoraŭ longe restu ĉepinte de la esperantistaro en Baltio. Tiaj respektindaj kaj kompetentaj personecoj ege necesas por malgrandaj asocioj en tempoj malfacilaj, en landoj kiuj riskas esti forgesitaj de la cetera mondo.

Andy Künzli (Svislando)

Eldoniĝu vortarego

Por eldoni la Esperanto-estonan vortaron plej grandan iam ajn, estis establita fonduso, kiu jam enhavas 9810 kronojn (ĉ.1380 gld.), senditajn ankaŭ el eksterlando. Pluaj subtenoj estas bonvenaj al la UEA-konto "esfa-h" de Estona E-Asocio. (*Informoj de E-Asocio de Estonio*)

Aplikata interlingvistiko, de latino ĝis Ido

Centro por Dokumentado kaj Studado pri la Internacia Lingvo (CDELI) aranĝis kun Kultura Centro Esperantista (KCE) en la svisa La Chaux-de-Fonds la duan interlingvistikan kolokvon (2-3 nov.) pri la kadrotemo "Esplorkampoj de aplikata interlingvistiko". Partoprenis ĉ. dudek interlingvistoj kaj interesatoj.

D-ro Detlev Blanke revuis la aktualan staton de interlingvistiko, aparte en la profesia lingvistika pejzaĝo. Li ne nur traktis kelkajn teoriajn problemojn, sed ankaŭ prezentis scienc-organizajn aspektojn, i.a. alvokante al pli bona kunlaborado de interlingvistoj kaj esperantologoj. D-rino Věra Barandovská-Frank informis pri la multjaraj klopodoj de Erich Weferling konigi kaj "plibonigi" sian projekton Intal. La arkivisto de CDELI, Claude Gacond, prezentis novajn materialojn pri la vivo kaj interlingvistika agado de René de Saussure, pri kies ebla influo al sia frato, la fama lingvisto Ferdinand de Saussure, bedaŭrinde ankoraŭ ne aperis dokumentoj. D-ro Giorgio Silfer, prezidanto de KCE kaj vicprezidanto de Esperanta PEN-Centro, prezentis unikan itallingvan enciklopedion de Albani/Buonarroti, *Aga Magéra Difúra*, kiu traktas pri inventitaj lingvoj (do ne nur pri planlingvoj en la konata signifo). Tomasz Chmielik el Pollando konigis siajn esplorojn pri la provo de la fama polisto Samuel Bogumil Linde (1771-1847) krei interslavan lingvon. Li krome prelegis pri la klopodoj de Zamenhof normigi la jidan lingvon. Natalia Dankova-Stackler, juna lingvistino el Parizo, prezentis informojn, surbaze de siaj esploroj de parolata Esperanto, pri la gepatro-lingva influo al la verbo-uzo en Esperanto.

D-ro Tazio Carlevaro, funda konanto de pluraj planlingvoj, prezidanto de CDELI, konata interlingvisto, informis pri la rezultoj de siaj sociologiaj esploroj pri la svisa E-movado. La instruistino Mireille Grosjean donis

superrigardon pri la bunta bildo de la kulturaj kaj lingvopolitikaj problemoj ene de Svislando. Fine ni aŭskultis terminologi-rilatan prelegon de la svisa instruisto Alain Favre, pri lingvaj aspektoj de la apliko de Esperanto en biologio, kompare kun la angla, franca, germana, itala kaj latina.

Por kelkaj eltenemaj interlingvistoj, post la oficiala fermo de la kolokvo, Carlevaro prezentis apartan frandaĵon: li gvidis en flua Ido seminarion pri la lingvistikaj trajtoj kaj la historio de Ido. Ĝi okazis en la ĉefa studinvita ejo de la arkivego de CDELI, kaj daŭris plu dum agrablaj promenoj en la belaŭtuna ĵuraso.

Estas planate eldoni la prelegojn libroforme, kiel okazis pri la materialoj de la unua kolokvo en 1994.*

Detlev Blanke (Germanio)

* *Premier colloque d'interlinguistique: Contributions.* Red. Tazio Carlevaro. Plejparte en Esperanto. Bellinzona: Hans Dubois, 1994. 114p. 21cm. 30,00 gld.

Memore al Ostwald

"Ĉu internacian planlingvon por la scienco?" Tio estis la kadra temo de publika interlingvistika memor-kolokvo en Berlino.

Honore al la germana Nobel-premiito kaj planlingvisto Wilhelm Ostwald, kunvenis 25 interesatoj la 9-an de novembro en Humboldt-Universitato, ĝuste kie Ostwald antaŭ preskaŭ precize 90 jaroj (7 nov. 1906) faris sian faman prelegon "La internacia helplingvo kaj Esperanto". Post malfermo fare de prof. d-ro Bengt-Arne Wickström, la vivon kaj verkon de Ostwald kaj la agadon de la Ostwald-societo prezentis ties membro Ralf Dyck. D-ro Detlev Blanke montris ke multaj ideoj de Ostwald pri la problemoj de planlingvoj evidentiĝis pravaj, aliaj male, des pli ĉar Ostwald ligis sian agadon aparte al Ido, kiu nun apenaŭ plu havas adeptojn. Fritz Wollenberg, prezidanto de E-Ligo Berlin, surbaze de siaj esploroj en arkivoj parolis pri la vigla korespondado de Ostwald kun ĉ. 40 interlingvistoj kaj planlingvanoj. La prelegojn Societo pri Interlingvistiko (GIL) publikigos en aparta kajero. *db*

Festi konference en Budapeŝto

En la Universitato ELTE de Budapeŝto la E-Fako festos sian 30-jaran ekziston en 1997. Ĉe ELTE oni povas diplomiĝi pri esperantologio, Esperantaj kulturo kaj literaturo.

Por festi la datrevenon, la universitato aranĝos sciencon konferencon (17-18 apr.) pri esperantologio, kun prelegoj kaj studoj en subsekcioj pri la E-kulturo, instruado de Esperanto, Esperantaj lingvo kaj literaturo, kaj movadhistorio. La prelegoj povas okazi en iu ajn lingvo, sed oni anticipe sendu resumon en Esperanto. La konferenca broŝuro aperos unue nur en Esperanto. Partopreno en la konferenco estas *senpaga*, por aŭskultantoj same kiel por prelegantoj.

Preleg-resumojn kun personaj indikoj sendu ĝis la 31-a de januaro al: Universitato ELTE, Esperanto-Fako, Piarista köz 1, HU-1052 Budapest, Hungario.

László Szilvási (Hungario)

István Szerdahelyi (1924-1987), fondinto de la E-fako en Budapeŝto



Estas tempo rekotizi por 1997!

Frua pago certigas la kontinuecon en la ricevado de ĉi tiu revuo. Krome, ĝi helpas la laboron de la Centra Oficejo kaj ŝparas monon al UEA. *Antaŭdankon!*

Ĉeesti, observi, informi

Atentaj legantoj de siaj nacilingvaj ĵurnaloj verŝajne rimarkis ke en Romo okazis de la 13-a ĝis la 17-a de novembro Monda Pinto-Konferenco pri Nutraĵoj. Ne sen esperantistoj, kiel vi nun ekscios.

Temis pri klopodo de Nutraĵ- kaj Agrikultur-Organizaĵo (NAO) de UN devigi ŝtatojn interkonsenti por forigo de malsato en la mondo. Oni rajtas havi sian opinion pri la sukceso aŭ malsukceso de tiaj konferencoj; en la monda forumo oni povis aŭdi la konservemon de kelkaj sataj ŝtatoj, la helpopetojn de kelkaj malsataj ŝtatoj, kaj la elstarajn alvokojn de mondaj gvidantoj, kiel la Papo kaj Fidel Castro (kiuj, pro ironio de la historio, subtenas nun la samajn ideojn rilate al evoluo de subevoluintaj popoloj).

La monda esperantistaro, oficiale invitita observi tiun konferencon, estis reprezentata, inter milo da aliaj neregistaraj organizaĵoj (NRO-j), pere de observanto komisiita de UEA. Samtempe, samurbe kaj samtempe okazis Forumo de NRO-j. Jam iĝis kutimo ke grandaj konferencoj de UN pri mondaj problemoj estas akompanataj de kunveno

de NRO-j, kiuj iel reprezentas la popolojn, kontraste al la oficialaj delegitoj registaraj. Ankaŭ tie UEA oficiale ĉeestis samrange kun multe pli grandaj organizaĵoj (pensu nur pri la katolika Caritas) kaj prezentis siajn



informilojn, atentigis pri lingvaj problemoj, interŝanĝis opiniojn pri evoluhelpo ktp. La temo de la debatoj estis relative ekster niaj kutimaj zorgoj, sed

la fakto mem ke ni estis invitataj kaj partoprenis, donis al multaj homoj la ideon ke esperantistoj ekzistas kaj estas progresemaj interesiĝantoj kaj agantoj pri mondaj problemoj.

Eta komento, certe kliŝa por la legantoj de ĉi tiu revuo: dum en la ŝtatestra konferenco oni samtempe tradukis el kaj al ĉiuj oficialaj lingvoj, la partoprenantoj de la NRO-forumo debatis ĉefe en grupoj formitaj laŭ lingvoj. Ne okazis vera komunikado trans la baroj de la lingvoj angla, araba, franca kaj hispana. En tia situacio ne estas malfacile eltiri el neesperantistoj favorajn komentojn pri la rolo de Esperanto.

La verkinto de ĉi tiu artikolo estis observanto por UEA en la ŝtatestra konferenco, sed la ĉefan laboron ĉe la UEA-tablo en la Forumo de NRO-j faris la ĝenerala sekretario de Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio, Lilia Fabretto. Ĉeestis la Forumon, en la kadro de aliaj asocioj, ankaŭ la esperantistoj Anna Löwenstein (Italujo) kaj Vagn Frausing (Danlando), kiuj havis materialon en Esperanto pri siaj asocioj kaj kuninformis pri la internacia lingvo.

Renato Corsetti (Italio)

AKADEMIO DE ESPERANTO

Ĉu lingva fajrobrigado?

La Akademio sub nova gvidantaro kompletigas unu jaron da agado, kaj kvankam eble estas tro frue por konstati ĉu "nova balailo bone balaas", certe montriĝis ke la Akademio klopodas malfermi sin al la movado, aŭskulti la dezirojn kaj la bezonojn de la Esperanto-komunumo.

Tiu ĉi rubriko kaj la unuafoja forlaso, post dek sep jaroj, de la tradicia perslipa demandado dum la publika kunsido de la Akademio en la Praga UK (sept., p. 151) estas du iniciatoj en tiu direkto. Ĉi-okaze mi denove emfazas ke la akademia rubriko funkcii kiel du-direkta kanalo, do ankaŭ kiel podio por la legantoj, kaj mi invitas viajn reagojn, ne nur pri lingvaj temoj. [Adreso en la kolofono.]


Kiel la Akademio evoluu por adapti sin al la nuntempaj bezonoj kaj ebloj? Pri perspektivoj de la akademianoj vi

povis legi pli frue (feb., p. 30; apr., p. 70; maj., p. 88; jul.-aŭg., p. 128). La opinioj kaj bezonoj de la lingvo-uzantoj aŭdiĝis en Prago. Ŝajne ĉiuj konsentas ke la Akademio devas esti je la servo de la movado — sed kiamaniere?

Mi ŝatus prezenti unu manieron transponti tiun distancon. Ofte oni esprimas la bezonon ke la Akademio traktu ne nur principajn problemojn, sed foje ankaŭ demandojn pri unuopaj vortoj. Pri tiuj la komunumo bezonas rapidan respondon: ekz. redaktoroj ne povas atendi jarojn,

eĉ ne monatojn, por decidi ĉu la Esperanta nomo de la eŭropa monunuo estu *eŭro* aŭ *eŭroo*. Se tia respondo prokrastiĝas, ĝi maltrafas la celon, ĉar la ĉiutaga uzo faras sian elekton, kiun la Akademio ne sukcesas poste ŝanĝi per tro malfrua decido. Tamen, rapideco neniam apartenis al la kvalitoj de la Akademio. Por solvi tiun dilemon la Akademio nun diskutas pri kreo de "konsilgrupo" (ŝercnome "fajrobrigado" — kvazaŭ por estingi lingvajn incendiojn...) el rapide (rete kaj fakte) kontakteblaj akademianoj, kiuj povos liveri lingvajn konsilojn pri urĝaj demandoj post relative mallonga interkonsiliĝo. Tiuj konsiloj eble ne estos oficialaj kaj ne portos la aŭtoritaton de la tuta Akademio, sed ili estos haveblaj ĝustatempe, en la momento de bezono.

Amri Wandel



Alta nivelo en Uralo


Sveda alumeto. Anton Ĉeĥov. El la rusa trad. A. Korĵenkov k.a. Sverdlovsk: Sezonoj, 1991. 139p. 20cm. 21,00 gld.

Princidino Mary. Miĥail Lermontov. El la rusa trad. Nikolaj Danovskij. Jekaterinburg: Ruslanda Esperantisto, 1996. 71p. 20cm. 9,00 gld.

La unua amo. Ivan Turgenev. El la rusa trad. I. Novikova k.a. Jekaterinburg: Sezonoj, 1993. 68p. 20cm. 9,00 gld.

Estas ĉiam malfacile traduki verkojn de pasintaj jarcentoj. Ĉiu lingvo evoluas, sed je malsama ritmo: dum por franca leganto la lingvaĵo de Moliere (17. jc.) estas ankoraŭ viva kaj tute komprenebla, ruso bezonas tradukon eĉ el la lingvo “antaŭ-Puŝkina” de la 18-a jarcento. Certe, Lermontov,

kiu eniris la rusan literaturon. *Princidino Mary* estas kerna novelo de tiu romano, sed povas esti legata kiel aparta kaj memstara verko. La esperantiginto, Nikolaj Danovskij (1905-1988), estis unu el la plej spertaj tradukistoj de la malnova generacio. Lia facile legebla kaj samtempe Lermontove originala,



Domo en Courtavenel (Francio), kie Turgenev pasigis multajn jarojn.
(Laŭ pentraĵo de lia amatino Pauline Viardot-Garcia, reproduktita sur la E-eldono de *La unua amo*.)

Turgenev kaj Ĉeĥov restas hodiaŭ kompreneblaj, sed multaj iliaj vortoj ne plu ekzistas, nek la nocioj kiujn ili spegulis. Jen defio por E-tradukantoj.

Sveda alumeto prezentas 24 novelojn de Ĉeĥov (1860-1904) el la 1880-90-aj jaroj, kiuj ebligas vidi malsamajn flankojn de lia verkaro. Redaktoro Aleksandr Korĵenkov elektis jen simplajn anekdotojn, jen novelojn primokantajn provincajn morojn, sed ankaŭ novelojn kun profunda soci-kritika enhavo. La tradukantoj faris ĉion eblan por trovi adekvatajn variantojn en Esperanto, kaj la novelaro atestas pri alta nivelo de tradukarto kaj eldonkulturo.

Miĥail Lermontov (1814-1841), poeto, romanisto, dramverkisto, kreis en sia kvinnovela romano *Heroo de nia epoko* la faman tipon de “troa homo”,

poezieca *Princidino Mary* estas modelo de altnivela tradukarto.

“La unua amo” de Ivan Turgenev (1818-1883) estas lirika novelo, kie la amhistorio evoluas sur fono de grandaj ŝanĝoj en la rusaj socio kaj moroj. Sed ne nur historio povas esti interesa: Turgenev estas konsiderata kiel unu el la plej altnivelaj rusaj stilistoj. La tradukista triopo faris grandan kaj sukcesan laboron por konservi la stilon de la novelo.

Ĉi tiuj tri libroj atestas pri elstara eldonlaboro de uralaj e-istoj: ili elektis valorajn verkojn, zorgis pri altnivelaj tradukoj, necesaj klarigoj kaj esenca enkonduko. Mi deziras pluajn sukcesojn en la necesa kaj honora afero: konatigi legantojn de multaj landoj kun ĉefverkoj de la rusa literaturo!

Nina Korĵenevskaja (Rusio)

• Manlibro serĉas eldoniston

Tradukita el la angla sub la gvido de R.K. Jones kaj D.A. Portmann, *Ĝenerala, organika, kaj biologia kemio* de H.S. Stoker kaj M.R. Slabaugh ampleksas 575 A4-paĝojn kaj estas akompanata de 100-paĝa *Manlibro de solvoj*. Publikigita en 1988 kiel fortoke krampita multobligaĵo de Esperanto-societo de Ĉikago kaj Internacia Sciencia Asocio Esperantista, ĝi plu atendas vere indan eldonon.

• La iĝanta revuo

Francaj mondcivitanoj fondis la revuon *Le Monde en Devenir/La iĝanta mondo*, pri tutmondismo, federismo, ekologio kaj paco. Kvankam francilingva, ĝi enhavas E-rubrikon. Abono (100 frankoj por ses numeroj): B.P. 0631 FR-37206 Tours, Cedex 3, Francio. (*Horizontaal*)

• Reuz-redaktoro por Juna Amiko

Ekde 1997 *Juna Amiko* havos (mal)novan redaktoron: Géza Kurucz (Hitel u. 10, HU-6000 Kecskemét, Hungario) estis ja ĝia kunfondinto kaj redaktoro de 1972 ĝis 1982. Ĉiujn redakciajn aferojn (sed nur tiujn!) oni sendu al li (kontribuaĵojn, konkurso-solvojn, korespond-petojn ktp), sed administraĵojn (abonojn, adres-ŝanĝojn, plendojn pri nericevo ks) daŭre al: pf. 193, HU-1368 Budapeŝto, Hungario. N-ro 1996/3-4 fermos ĝustatempe la jarkolekton. La ĝisnuna (1986-96) redaktoro, Stefan MacGill, dankas ĉiujn kiuj helpis al la revuo bone adaptiĝi kaj travivi la lastajn dek perturbajn jarojn.

• En la fruaj tagoj de Unesko

En *Lien - Link*, bulteno de la Asocio de Eks-oficistoj de Unesko, Lionel Elvin — direktoro de la Eduka Departemento de Unesko inter 1950 kaj 1955 kaj Honora Patrono de UEA — rememoras pri “La fruaj tagoj de la Ĝenerala Konferenco” kaj rakontas i.a. kiel li surprizis ĉiujn per Esperantlingva parolado salute al UEA-estraranoj vizitantaj la Unesko-sidejon dum la 35-a UK en Parizo (1950).

Laste aperis



Amikeca Reto 97-98. Ambuazo, 1996. 138p. 21cm. 495 adresoj en 49 landoj, kie esperantistoj povas trovi nekutiman gastigadon laŭ la fako, interesoj, vizit-eblaj ktp. 24,60 gld.

Analektoj de Konfuceo. El la ĉina trad. Wang Chongfang. Beijing: Ĉina E-Eldonejo, 1996. 114p. ISBN 7-5052-0289-8. 21cm. Bind. Kromkovrilo. Kolekto de eldiroj kaj anekdotoj de Konfuceo kaj liaj disĉiploj; "la konfuceana Biblio". 27,00 gld.

Andreo Cseh — la *gaja stelo* kiel "edzperanto". Historio de romantika amo. Red. Ada Csiszár. Budapeŝto: la redaktinto, 1996. 56p. 21cm. Ilus. Kiel Cseh peradis inter estona "fraŭlino Esperanto" Veronika Eksta kaj hungara esperantisto Paŭlo Tolnai. Korespondo inter Cseh kaj Tolnai el 1929-30. 7,50 gld.

Babile kun mi mem. Poul Thorsen (1915). Brabrand: Beletra, 1996. 105p. ISBN 87-90444-00-0. 21cm. Bunta memorbukedo de observema kaj satirema verkisto, movadano, pri sia nekutime zigzaga vivoj. 22,80 gld.

Bildstria gvido al genetiko, La (1991). Larry Gonick kaj Mark Wheelis. El la angla trad. Sung Ho Cho. Seulo: Librejo Akademio, 1996. 216p. ISBN 89-7616-155-6. 22cm. Perbilda enkonduko por granda publiko, kun multe da humuro. 27,00 gld.

Esperanto als Ratespass. Ulrich Matthias (1966). Heidelberg: E-Jugend, 1996 (3-a, reviziita eld.). 45p. 21cm. Prezento de Esperanto per divenludoj pri sufiksoj kaj kunmetoj. 3,90 gld.

Eŭro-humuro kaj... sekso. Internacia antologio de erotikaj ŝercoj. Doktoro Petolanto, Gastprofesoro pri Kompara Erotiko ĉe la Eŭropa Universitato en Seksburgo. Eldonejo Peano, 1996. 34+38p. 21cm. Komplete de 2 tekstolibroj kaj 4 kasedoj. 278 malprudaj ŝercoj, lege kaj aŭskulte. 78,00 gld.

Familia lingvo: Esperanto. Kajeroj por multlingveco 3. Gilbert R. Ledon (1931). La aŭtoro (helpe al Rondo Familia de UEA), 1996. 19p. 22cm. Personaj spertoj pri esperantlingva edukado de siaj infanoj. 4,80 gld.

Ĝis revido krokodilido! Dek kvin noveloj originalaj. Sten Johansson (1950). Skövde: Al-fab-et-o, 1996. 68p. 21cm. Ok noveloj pri ĉiaj homaj temoj, kaj sep satiraĵoj pri Esperantio. 12,60 gld.

Interkona mateno. Kvar teatraĵoj originalaj. Sten Johansson (1950). Skövde: Al-fab-et-o, 1996. 52p. 21cm. Situaĵoj burleskaj, kun grava mesaĝo subkuŝanta. 10,50 gld.

Introduktion till Esperanto. Bertil Nilsson (1933). Skövde: Al-fab-et-o, 1996 (2-a, ĝisdatigita eldono). 32p. 21cm. Por svedlingvaj komencantoj. 5,40 gld.

Kanto de telegrafistoj. Josip Velebit (1911). Berkeley: Bero, 1996. 78p. ISBN 1-882251-14-8. 22cm. Vivoverk-resuma poemaro de aŭtoro konata el *Esperanta Antologio*. 10,50 gld.

Kiu parolas Esperanton? / Wer spricht Esperanto? Analo de la Esperanto-movado en Germanio laŭ soci-demografiaj, asoci-politikaj, soci-kulturaj aspektoj. Frank Stocker (1968). Red. Martin Haase. München/Newcastle: Lincom Europa, 1996. 150p. ISBN 3-89586-097-2. 21cm. Dulingva: germana/Esperanto. Analo de enketo farita en 1992 inter la membroj de Germana E-Asocio. 72,00 gld.

Ludovikologia dokumentaro XIV. L'Esperantiste I. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1996. 667p. 22cm. Jarkolektoj 1898-1900 de la franclingva E-revuo, redaktita de L. de Beaufront, kiu tiom influis la publikan opinion de sia tempo. 72,00 gld.

Ludovikologia dokumentaro XV. L'Esperantiste II. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1996. 535p. 22cm. Jarkolektoj 1901-1902 de la sama. 72,00 gld.

Ne-sigan-mane ikhinun chigu-o Esu-pheranto ("La globolingvo Esperanto lernebla en 4 horoj"). Tsukasa Kobayashi (1929) kaj Yoko Hagiwara (1947). Kore-lingva. El la japana trad. Kim Yung-myung kaj Jung Hee-ja. Taegu: KEA-Filio, 1996. 227p. 19cm. Enkonduka lernilo por "inteligentuloj kiuj jam scias la anglan lingvon". 10,80 gld.

Parolturnaro germana-Esperanto. Hans kaj Kerstin Wiersch. Leuven: Esperanto

2000, 1996 (2-a, plikompletigita eld.). 448p. ISBN 90-71205-59-2. 21cm. Internacie kompreneblaj tradukoj de 21 000 germanaj frazoj, frazeroj, sintagmoj, dirmanieroj, idiotismoj kaj proverboj. 48,00 gld.

Plena vortaro de Esperanto kun Suplemento (1934). E. Grosjean-Maupin (1863-1933). Suplemento (1953) kompilita de G. Waringhien. Paris: SAT, 1996 (11-a senŝanĝa eldono). 511+63p. 17cm. Vortaro por ĝenerala uzo, kun difinoj en Esperanto. 54,60 gld.

Vortaro Esperanto-Suahila. Kamusi Ki-esperanto Kiswahili. Jan Knappert (1927). Rotterdam: UEA, 1996 (2-a reviziita kaj pliampleksigita eld.). 16+158p. ISBN 92-9017-027-1. 18cm. Dudirekta poŝvortaro kaj skizeto, en la suahila, pri la baza gramatiko de Esperanto. 18,00 gld.

Železnička stručna terminologija srpsko-esperantska i esperanto-srpska. Red. Gvozden Sredić. Beograd: Jugoslavija Asocio de Fervojistoj-Esperantistoj, 1995. 219p. 30cm. Ringe bind. Serba-E kaj E-serba listo de la pli ol 8000 terminoj de la ĝenerala terminaro de Internacia Fervoja Unio. 36,00 gld.

DIVERSAĴO

Glumarko Montpellier. 83-a UK de Esperanto 1998. Montpellier: LKK de la 83-a UK, 1996. 56x34mm. Trikolora preso. Folio kun 32 glumarkoj. 7,50 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA. Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insiginoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!



NOVA ASTERIKS!

Asteriks ĉe la Olimpiaj Ludoj estas la nova plenkolora bildstria albumo en Esperanto. Tradukis: Jean-François Cousineau kaj Patrick Lagrange. 48p. Prezo: 19,80 gld. Ekde ĉi tiu volumo UEA fariĝis la ĉefa distribuanto de Asteriks-libroj kaj donas *trionan rabaton* ekde 3 ekz.

SENĜENAJ DIALOGOJ

UEA aĉetis la stokon de ĉi tiu fascina verko de Alberto Fernández pri la fundamentaj natur-sciencaj demandoj (materio, atomo, tempo, gravito, evoluo, genetiko, biosfero). 197p. Multaj ilustraĵoj. La prezo malaltiĝis de 29,70 al 18,00 gld. *Triona rabato* ekde 3 ekz.





• Biblioteko: Katalogo havebla

Alena Germana E-Biblioteko disponigas sian aktualan katalogon, kun pli ol 10 000 bibliotekaj unuoj, sur disko 3,5-cola, por komputilo IBM-kongrua. Aktualigoj aperos regule. Mendu por 15 germanaj markoj aŭ 18 gld. (50%-a rabato por B-landanoj). Antaŭpagu al Ottmár Járeb, Blücherstr. 42, DE-71116 Gärtringen, Germanio; UEA-konto "otja-u". (Interredaktore)

• Fervojistoj: Ĉu IFEF emerita?

Laŭ la resuma jarraporto de la 24 landaj asocioj de Internacia Fervojista E-Federacio, ĉi tiuj nombris en 1995 entute 119 grupojn kaj 4172 membrojn, 6 resp. 214 (4,9%) malpli ol en la antaŭa jaro. La membraro de IFEF mem falis 9,9% kompare al 1992: de 1852 al 1669. Emeritoj konsistigis 60% de la membraro en 1994, sed jam 74% en 1995. E-lingvaj klarigoj nuntempe aperadas en la horarlibroj de Ĉeĥio, Danio, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Rumanio kaj Slovakio. (*Internacia Fervojisto*)

ANONCETOJ

Koresponde instruas la rusan kaj aliajn lingvojn de eks-Sovetio, per Esperanto aŭ la angla, Mihail Korotkov (Pk. 642, RU-652500 Leninsk-Kuznecki, Kemerova reg., Rusio). Li ankaŭ petas peradon de lia anonco al diverslandaj senpagaj anonc-gazetoj.

Geedziĝis s-ino SONG Ĝong-ok el Koreio kaj s-ro Harald SCHICKE el Germanio la 1-an de novembro en Danlando. Nia nova adreso: Püttjerberg 17, DE-27383 Hetzwege, Germanio; ☎+49/263-9408-7, ✉-8.

Du gejunuloj serĉas laboron, ankaŭ pretaj profesie instrui Esperanton kaj aliajn lingvojn. Aleksandr Blinov, p.k. 56, RU-428900, Novoĉeboksarsk; ☎+7/8352/729-195; ✉greenhome@chuvashia.iasnet.ru.

Por akiri, retroŝte, varkatalogon de Istlia Eldonejo Esperantista, faru petmesaĝon al lorensmi@gn.apc.org.

• Infanoj: Eŭropaj interŝanĝoj

Kadre de la kunlabora programo de Kataluna E-Asocio kun E-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino (vd. apr., p. 67 kaj jun., p. 119), 15 infanoj el Bosnio feriiis inter la 7-a kaj 28-a de julio ĉe familioj en Barberà, Polinyà, Sant Quirze kaj en Sabadell, kie ilin akceptis la urbestro Antoni Ferrès (meze, malantaŭ la infanoj). La amikaj ligoj inter la infanoj de la du landoj daŭros per E-lingva korespondado, kaj ambaŭ asocioj organizas apartajn infankursojn tiucele. (L. Puig)

En Francio, iniciate de la Tuluza E-Kultur-Centro kaj Tuluzaj E-istaj Fervojistoj, en la proksima Sainte Foy d'Aigrefeuille 30 infanoj 10-11-jaraj lernis de Josée Lafosse en la normala lerneja tempo Esperanton por akcepti en du juliaj semajnoj naŭ samaĝulojn el Kievo, akompanatajn de Larisa Lineckaja. Necesis eĉ vespera kurso por la komunikemaj francaj patrinaj. La infanoj el Ukrainio poste gastis ĉe E-lernantaj infanoj en la regiono de Carmaux kaj fine revidis siajn geamikojn el Sainte Foy en dektaga somerumo en la Pirene-montara Arout. (J.-M. Cash)



• Komunistoj: Internacio

En sia 10-a Konferenco (29 okt. – 3 nov., Lisbono), ĉeestata de 20 personoj, Kolektivo E-ista Komunista (KEK) ŝanĝis sian nomon al Internacia Komunista E-ista Kolektivo (IKEK). Konsekvence, la diversaj landaj KEK-j estas memstaraj asocioj, sendependaj de IKEK. La novan IKEK-estraron prezidas Andris Natinj kaj vicprezidas Anne Johnson. En kunveno kun konferencanoj, reprezentantoj de Portugala Komunista Partio asertis ke PKP favoras Esperanton kaj ke iliaj gejunuloj tre baldaŭ eklernos ĝin. IKEK sendis protestmesaĝon al Ĉilio kontraŭ la aresto de Gladis Marin pro "insulto" al la eks-diktatoro Pinochet. La venonta Konferenco okazos en septembro aŭ oktobro 1997 en Bulgario. (V. Charlot)

• Kulturo: Aix nun sen E-fako

La Esperanto-fako en la Universitato de Aix-en-Provence (Francio) ĉesis funkcii. (M. Duc Goninaz)

• Kulturo: Fontolingvo-teorio

Organiza Societo de Internaciaj E-Konferencoj (OSIEK) ĉiujare konferencas pri scienca temo. Ĉi-jare (13-19 jul., Poprad, Slovakio) oni traktis "Esperanto kaj imperiaj lingvoj en internacia uzado". Ardan diskuton provokis teorio de filozofo Eugène de Zilah, laŭ kiu Esperanto estas daŭrigo de siaj fontolingvoj (angla, franca, germana, latina) kaj rajtas funkcii kiel heredanto, eĉ daŭriganto, de ties kulturoj. Bruno Masala prelegis pri internaci-igo kaj -igo de la latina lingvo. Milan Zvara enkondukis en la historion de Slovakio. La ĉiujara premio de OSIEK estis aljuĝita al Paul Gubbins pro lia lernolibro *Kunvojaĝu* (vd. recenzon en feb., p. 27). (J. Derks, *La Gazeto*)

La sekva IEK temos pri "Helenaj influoj en la mondkulturo" (Rafina apud Ateno, 12-18 jul.). Kontaktu: Eric Laubacher, OSIEK, 1 rue des Vosges, FR-78180 Montigny-le-Bretonneux, Francio; ✉Eric.Laubacher@mail.dotcom.fr.

• Scienco: Pri kolizio de kulturoj

Pli ol 500 sciencistoj laŭtlegis referaĵojn kaj interŝanĝis fakajn spertojn en la 5-a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto (2-7 sept., Pekino). Por ĉerpi du interesajn temojn: Esploristo XU Daoyi analizis la kolizion de la ĉina tradicia kulturo kun la moderna scienco, kaj konkludis ke la 21-an jarcenton karakterizos ne plu regado de okcidenta kulturo, sed kompletiga kunekzisto de pluraj kulturoj. Veterana e-isto LIU Ling argumentis ke la angla lingvo malhelpas la populariĝon de komputiloj. (Li Yuping)



• Bosnio kaj Hercegovino: En Serba Respubliko

Ĉirkaŭ 30 personoj el 11 urboj diskutis ĉe ronda tablo en la Unua E-ista Renkontiĝo de Serba Respubliko (12-13 okt., Brĉko) pri la evoluo de la E-movado en la respubliko. En la regionoj kie Esperanto estis forta antaŭ la milito, movadan revigliĝon aŭguras la kursoj i.a. en la urboj Kozarska Dubica, Prijedor kaj Tesliĉ, kiujn finas preskaŭ ĉiuj enskribitoj. Okazis prelego pri Interreto kaj ĝia uzado. Raporto de ĉeestinta ĵurnalistino aperis en la gazeto *Glas srpski* de la urbo Banja Luka, kie la 23-an de marto fondiĝis E-Ligo de Serba Respubliko (p.p. 335, 78000 Banja Luka; ✉esperoel@elf.elf.bl.ac.yu) (G. Kragić, *Jugoslavia Fervojisto*)

• Italio: Prezidenta saluto

Oscar Luigi Scalfaro, la prezidento de Italio, sendis la 15-an de okt. salutmesaĝon al "Esperanto" Radikala Asocio. "Mi estas konvinkita ke, sen instrumento por plifaciligi la reciprokajn interkomprenon kaj la konon de la [...] diversaj tradicioj en nia kontinento [...] Eŭropo ne kapablos efike alfronti la malfacilajn defiojn de la integriĝo, de la asimiliĝo de la novaj kandidataj landoj, de la tutglobiga proceso de la monda ekonomio" — skribis Scalfaro, kiu en 1987 jam faris paroladon en E-kunveno kaj ankaŭ poste salutis E-eventojn. (Interredaktore)

• Turismo: Helpu de sube Manilon

Prelegantoj pri "Turismo kaj komunikado" senpage gastis en la Hungaria E-ista Semajno (27 sept. - 4 okt., Budapeŝto), dank' al subvencio de la urba turisma oficejo. Malferme prelegis d-ro Márton Lengyel, iniciatinto de tiu Manila deklaro pri turismo kiu en 1980 substrekiis la gravecon de Esperanto por instigi komunikadon inter turistoj, loĝantoj de la vizitataj lokoj kaj turismaj funkciuloj. Ĉi-riate en Budapeŝto oni konstatis ke "desuprismaj" agadoj apenaŭ valoras sen "desuba" helpo. (O. Prncz)

• Kroatio: Heredaĵo dividita

Emilija Lapenna (1910-1994) testamentis 809 titolojn de sia biblioteko al Kroatia E-Ligo kaj Kroata E-ista Unuiĝo. Post dujara prilaboro fare de Lucija Borčić (ŝia kunlaborantino), Ivica Špoljarec (eksa sekretario de KEL) kaj Marija Belošević (sekretario de KEU), ĉi-aŭtune la heredaĵo estis dividita inter KEL kaj KEU, sed restos alirebla por ĉiuj interesatoj. KEU ricevis i.a. la E-korespondataĵojn, kiujn ĝi planas pristudi por prezenti la rezultojn de la studo al la publiko. (M. Belošević)

• Nederlando: Rekorda tago

Jam kvinan fojon aranĝita la 9-an de novembro, la Malferma Tago de la Centra Oficejo logis pli da vizitantoj ol iam ajn: venis ĉ. 120 esperantistoj precipe el Nederlando kaj Belgio, sed 15 ankaŭ el Germanio. Pintis en la programo tri prelegoj de ĉefgasto Humphrey Tonkin pri Centro de Esploro kaj Dokumentado, prezento de vidbendoj, kaj multe da E-lingva babilado en la koridoroj kaj kafĉambro de la CO. La gastoj pleje amasiĝis en la Libroservo, kie vendisto Simo Milojević kaj volontulino Mariko Aoshima fakturis en tiu sabato 7008 guldenojn kaj 1 cendon.

Tri tagojn poste aperis en la Haga ĵurnalo *Haagsche Courant* tutpaĝa artikolo pri "La ideala lingvo", ilustrita de foto de la Libroservo dum la Malferma Tago.

En la populara gazeto *De Rotterdamse Straatkrant*, vendata de senhejmuloj por ilia vivteno, en novembro unupaĝa artikolo "Esperanto en Rotterdam" baziĝis sur intervjuo kun István Ertl. Ĝi mencias i.a. ke la Roterdama urbodomo de kelka tempo uzas E-on sur multlingvaj dokumentoj, ekz. sur ekstrakto el la registro de loĝantaro.



• Buller: Kontraŭ finna dormemo

Ĝenerala direktoro Osmo Buller prelegis fine de oktobro pri la lingva situacio en EU kadre de la Internacia Semajno de Oulu. La Finna Televido intervjuis lin pri la sama temo en tutlanda novaĵelsendo kaj la regiona radio de Oulu en populara muzikprogramo. Pro la ĵusaj elektoj de finnaj eŭro-parlamentanoj Buller uzis la okazon por kritiki la dormemon de la antaŭaj deputitoj rilate la lingvan reĝimon de EU.

• Futran: 100-jara

En Rockville (Marilando, Usono) sian centjarigon festis, la 31-an de oktobro, esperantistino Louise Futran. Ŝi naskiĝis en Frankfurto kaj lernis E-on en Germanio de sia estonta edzo, Johano Futran, al kiu ŝi edziniĝis en 1924. Post la dua mondmilito ambaŭ vivis en Novjorko kaj aktivis en la tiea E-vivo ĝis la morto de Johano en 1985, de kiam Louise loĝas en Rockville. Gratulon al la jubileantino! (R. Grossman, *Novjorka Prismo*)



• Hujucz: Egalis Esperanton

"Kiel via Esperanto?" — kutimis demandi eĉ Mao Zedong kaj ĉefministro Zhou Enlai renkontante Hujucz (1896-1986), iaman prezidanton de Ĉina E-Ligo, kiu naskiĝis antaŭ 100 jaroj. La 3-an de septembro ŝtataj gravuloj, la 9-an de septembro esperantistoj rememoris en kunsidoj pri Hujucz, kies nomo por multaj ĉinoj egalas al Esperanto. (Bai Son)

Enriqueta ALMANZA, tre populara kuba aktorino, fratino de la esperantista aktorino Georgina Almanza, mortis la 11-an de aŭgusto.

Elsbeth BORMANN (1930-1996) forpasis la 26-an de oktobro en Hamburgo. Lerninte Esperanton en 1950, ŝi agadis je ĉiuj niveloj de la movado, precipe en la kampoj de informado, eŭropa kaj virina agado. Ŝi estis i.a. estrarano de Hamburga E-Societo



Elsbeth Bormann

(1967-70, 1976-78); afergvidanto de Nordgermana E-Ligo (1969-72); estrarano (1973-77), prezidanto (1977-83 kaj 1994-95) kaj honora prezidanto (1983) de Germana E-Asocio; kunfondanto (1977) kaj prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio (1980-81 kaj 1995-). Ŝi membris en la LKK de la Hamburga UK (1974), laboris en la gazetaraj servoj de pluraj UK-oj en germanlingvaj landoj (1974, 1979, 1985), kaj estis la ĉefa organizanto de la germanaj landaj kongresoj en 1980 kaj 1981. UEA-membro dum 30 jaroj,

ŝi funkciis kiel loka delegito (1969-82), vic- kaj fakdelegito pri eŭropa agado (1983-) kaj komisiito de UEA pri Virina Agado (1975-77, 1989-92), temo pri kiu ŝi aperigis Esperanto-dokumenton en 1976 kaj organizis UEA-seminariojn en 1981, 1982 kaj 1988. Pro sia E-aktivado ŝi ricevis en 1981 Federacian Meritkrucon de la ŝtat-prezidanto.

Esperanto kaj familio por Elsbeth Bormann sinonimis: ŝi estis la edzino de Werner Bormann kaj la patrino de Thomas Bormann kaj Judith Jackson, ĉiuj konataj movadaj aktivuloj.

José CLIMENT GRAÑANA (1923-1996) mortis la 5-an de aŭgusto en Barcelono, kie li agadis en Hispana Instituto de Esperanto de 1961 ĝis 1975, tempo kiam la Barcelona Internacia Foiro eldonis siajn afiŝojn en Esperanto. Li zorgis pri multaj kursoj kaj pri la daŭra reeldonigo, ĉe Sopeña, de la dudirekta E-hispana poŝvortaro de Paluzie-Borrell. Ekde ĝia fondo en 1986, li estis komitatano de Kultura Asocio E-ista.

Ladislav KYNČL (1910-1996), prezidanto de la Praga E-Klubo, delegito pri ĝardenkulturo dum pluraj jardekoj, mortis en Kladno la 15-an de aŭgusto. Verkistino Eli Urbanová rememoras lin kiel sian instruiston kiu per E-o malfermis al ŝi la mondon.

Bob MELLORS (1949-1996), brita esperantisto, kunfondinto de Gej-Liberiga Fronto en Britio, estis murdita la 22-an de marto en Varsovio.

Ada en ĉies koroj

Kiel legeble en ŝiaj rememoroj *De tajgo al minaretoj* (1991), Ada Fighiera-Sikorska pasigis kiel militrifugiinto tri infanajn jarojn (1942-45) en Irano kun siaj patrino kaj avino. Post la milito ĉi tiuj restis en Irano kaj nun estas enterigitaj tie. La patrino de Ada mortis komence de la iraka-irana milito (1980-1988). Kelkajn jarojn poste Ada maltrankviliĝis pri la stato de la patrino tombo en Teherano, sed lokaj e-istoj grupe vizitis la tombon kaj sendis al ŝi foton por pruvi ĝian sendifektecon. La rilatoj inter Ada Fighiera-Sikorska kaj

la irana movado ĉiam restis intensaj kaj koraj, kaj ĉi tiu "kun ŝia forpaso perdis unu el siaj ege sinceraj amikoj". (Ĵ. Sedighi)

En Zagrebo la e-istoj adiaŭis Adan per speciala vespero la 25-an de septembro, en kiu Spomenka Ŝtimec parolis pri ŝia laboro kaj legis el *De tajgo al minaretoj*. (S. Ŝtimec)

Memorkunvenoj okazis ankaŭ en Torino (9 okt.) kaj Krakovo. Pola Radio dediĉis al ŝi specialan elsendon. La oktobra kultura monاتفino en Kultura Centro Esperantista (La Chaux-de-Fonds), kie ŝi devintus mem prelegi, estis dediĉita al la memoro de Ada Fighiera-Sikorska. (*Heroldo*)

Norman Williams (1908-1996)

Norman Williams, Honora Membro de UEA ekde 1989, mortis la 11-an de oktobro en Denton (Britio).

Williams naskiĝis la 8-an de aŭgusto 1908 en Liverpolo (Britio); studis fizikon, matematikon kaj edukadon; laboris unue kiel instruisto, poste kiel lernejestro (1941-70). Li informiĝis pri Esperanto en 1947 ĉe klubo de Rotario, fako pri kiu li estis UEA-delegito ekde 1965. Jam en 1948 li enkondukis la lingvon kiel devigan studobjekton en sian lernejon. Malgraŭ diversaj kontraŭstaroj, tiu lerneja instruado daŭris 27 jarojn, kaj pli ol 3 000 geknaboj lernis Esperanton tie, ĉefe de James H. Sullivan (1913-93), kiun Williams postenigis en la lernejo. En la periodo 1950-69 Williams organizis 16 internaciajn vojaĝojn por siaj ge-



Norman Williams

lernantoj de Esperanto. Similan agadon li poste stimulis kiel la ĉefa aganto (1966-86) de Noriĉa Jubilea Esperanto-Fondaĵo, kies celo estas subvencii vojaĝojn de junaj esperantistoj eksterlanden. Tio estis verŝajne la plej grava kaj efika kontribuo de Williams al Esperanto: multaj aktivuloj de la brita kaj internacia movadoj spertis sian unuan kongreson per helpo de la fondaĵo. Williams havis gravajn meritojn ankaŭ pri la daŭrigo de la tradicia instruado de Esperanto en la Universitato de Liverpolo. Sian ampleksan E-libraron li donacis al la Universitato de Manĉestro, kie ĝi restas daŭre alirebla por la publiko.

Ĉe personaj nomoj kursiva cifero indikas aŭtorecon de teksto, dika cifero rilatas al foto. Aliloke dika cifero aludas relative longan artikolon pri la temo. Ĉe libroj, kursivaj titoloj signalas recenzitajn verkojn.

Åberg, L. 100
 Abontarifoj 198
 Afriko 13, 21, 65, 110, 125, 156, 178
 Ago-Tago 109, 132, 201
 Akademio de Esperanto 30, 70, 88, 128, 151, 213
 Akademio Internacia de la Sciencoj 28, 139, 185, 198, 199
 Akordo 153
 Albano 111, 129, 177
 Albault, A. 70, 178
 Almanza, G. 152
 Alos, H. 14, 67, 74
 Ameriko 61, 110, 157
 Amoureux, J. 173, 178
 Aquilina, G. 26
 Argentino 38, 110, 138
 Artero, F. 14, 58, 67
 Arto 58, 138, 179, 198, 199, 206
 Auld, W. 14, 32, 113, 130
 Aŭstralio 65, 79, 92, 111, 210
 Aŭstro 48, 75, 78, 98, 112, 182
 Azio 12, 110, 125, 181
 Bácskai I. 60
 Bahaismo 1, 36
 Bakker, H. 106, 110
 Banet-Fornalowa, Z. 22, 154, 179, 207
 Barlaston, E. 17, 153, 159
 Bartovská, M. 144, 167
 Bays, G.A. 9, 113
 Becker, U. 29, 148, 174
 Bekavac-Basić, I. 68
 Belartaj Konkursoj 113, 169, 187
 Beleva, B. 144, 152, 154, 167, 179
 Belgio 19, 48, 52, 79, 129, 132
 Belošević, M. 151, 159, 217
 Berman, H.R. 93
 Berthelot, F. 34
 Berthonneau, B. 173
 Berveling, G. 14, 31, 32, 74, 150, 151, 153
 Bharato 144, 181
 Bibliotekoj 98, 113, 160182, 216
 Biologio 124
 Bishop, J. 92
 Bitay L. 199
 Bjelorusio 119
 Blanke, D. 10, 78, 89, 106, 113, 137, 150, 197, 212
 Blinduloj 98, 127
 Bonino, E. 42-44
 Borges Gallego Soares, A. 172
 Bormann, E. 218
 Bormann, W. 30, 70, 78, 94, 150, 151, 159
 Bosnio kaj Hercegovino 58, 66-67, 111, 119, 144, 148, 190, 216, 217
 Boulet, J.-P. 172
 Boulton, M. 204
 Boutros-Ghali, B. 142
 Brazauskas, A. 82
 Brazilo 48, 52, 99, 110, 177, 190, 191, 201
 Britio 38, 52, 69, 97, 119, 129
 Brozovsky, J. 153
 Bulgara E-Teatro 23, 152, 204, 207
 Bulgario 75, 209
 Buller, O. 1, 25, 38, 74, 81, 144, 161, 203, 217
 Burundio 13
 Calment, J. 178
 Carvalho, A.H. de 99
 Casquero, A. 78, 199
 Centra Oficejo 14, 38, 47, 160, 199, 217
 Centro de Esploro kaj Dokumentado 102, 113
 Chapman, H. 77
 Choe T. 12, 125
 Chrdle, P. 5, 19, 36, 119, 125
 Chrdlová, S. 4, 119
 Cleij, P. 137
 Coffinet, E. 172
 Corsetti, R. 24, 26, 150, 184, 213
 Crisp, B. 174
 Cruz, M. 209

Ĉeĥio 2-8, 19, 111, 141-160, 185
 Ĉinio 19, 25, 37, 48, 119, 132, 138, 164, 177, 181, 184, 199, 201, 217
 Ĉolić, S. 58, 66
 Danio 36, 97, 177
 Danvy, J.-P. 8, 149
 Daŝgupto, P. 72, 74, 137
 De' Giorgi, A. 149, 151
 Delegitoj 105, 161
 Delforge, M. 106, 121
 De Salvo, A. 26, 87
 De Seabra, M. 148, 179
 De Smet, W.M.A. 124, 148
 Despiney, B. 109, 121
 Di Censo, J. 134
 Diego, F. de 194
 Dieterle, H.-B. kaj J. 197
 Dix, O. 178
 Dobrzyński, R. 17, 85, 202, 203
 Draper, D. 33
 Duc Goninaz, M. 30, 73
 Dupuis, O. 141, 154
 Durwael, I. 103
 Eco, U. 52, 90, 119, 133
 Edwards, J. 163
 Eichholz, R. 77
 Ekspozicioj 58, 132, 185, 190
 Eksteraj rilatoj 41, 42, 82, 84, 109, 121, 164, 184, 185, 213
 Ekzamenoj de UEA/ILEI 68, 159
 Elvin, L. 214
 Erasmus, H. 51, 78, 102, 109, 137, 141, 185, 192
 Ertl I. 8, 74, 81, 82, 102, 117, 148, 168, 169, 190, 217
 Estonio 211
 Estrara Raporto 105-116
 Estraro de UEA 81, 106, 144
 Eŭropa agado 1, 11, 24, 29, 42, 50, 51, 78, 109, 185, 189, 199, 217
 Eŭropa Burao por Malpli Uzataj Lingvoj 147
 Eŭropo 14, 66, 111
 Fakaj asocioj 29, 87, 103, 105, 114, 124, 151, 185
 Fantom, I. 77, 131, 160
 Fernández, M. 14, 74, 94
 Fervojistoj 114, 124, 216
 Fettes, C. 154, 160
 Fettes, M. 41, 49, 74, 102, 106, 109, 113, 121, 144, 150, 162
 Fiedler, S. 27
 Fighiera-Sikorska, A. 74, 145, 165, 218
 Filatelo 36, 51, 145
 Filipinoj 79, 111
 Financo de UEA 106, 115-116, 145
 Finnlando 20, 49, 79, 122, 217
 Foliume 75, 117, 214
 Fondadoj
 Afriko 154
 Ameriko 110
 Canuto 47
 Carson 160
 FAME 9
 Grabowski 154
 Karolo Piĉ 6
 Lapenna 198
 Fondumo Zamenhof 85, 202
 Fonseca, F. 177
 Fornal, J. 17, 154, 179
 Forumo 16, 36, 96, 136, 176
 Fössmeier, R. 28, 185, 192
 Francini, W.A. 120
 Francio 19, 48, 49, 51, 52, 58, 78, 79, 129, 132, 138, 139, 178, 190, 196, 199, 201, 216
 Frempong, Y. 79, 159
 Fröhlich, R. 78, 84, 179
 Futran, L. 217
 Gabrielli, L. 139
 Galajčuk, I. 99
 Ganao 79, 110, 156
 García Fumero, A. 96
 Germanio 11, 38, 48, 51, 58, 69, 78, 119, 130, 131, 161, 188, 192, 197, 199, 212, 216
 Gibczynska, J. 119, 154
 Gofen, A. 190
 Golden, B. 18, 36, 128, 206
 Gonin, H. 74

Goodheir, A. 60
 Gorbačov, M. 139, 198
 Gozzi Gorini, P. 16
 Grattapaglia, U. 61, 148
 Greatrex, G. 49, 109, 129, 189
 Grimley Evans, E. 8, 153, 189
 Gröning, Amikaro de Bruno 145
 Grossman, R. 41, 109
 Gubbins, P. 27, 216
 Gulyás, I. 124
 Güntel, C.J. 51, 192
 Haaf, D. ten 188
 Handikapuloj 145, 185
 Harmon, L. 166
 Haupenthal, R. 6, 71, 178, 211
 Havel, V. 37, 139, 143
 Hispanio 37, 48, 78, 98, 99, 178, 179, 191, 199, 209
 Historio 101, 125, 162, 173, 178, 197, 214
 Honoraj Membroj 105, 144, 167
 Horst-Kolińska, M. 17, 159
 Hounnake, R.K.E. 65
 Hršel, Z. 73
 Hujucz 217
 Hungario 37, 48, 50, 51, 62-64, 68, 78, 79, 138, 179, 199, 201, 212, 217
 Huzimoto T. 74, 149
 Infanoj 160, 170, 216
 Influo (suplemento) 49-52, 129-132, 189-192
 Informado 19, 29, 79, 109, 136, 158, 176, 196, 201 (vd. ankaŭ *Influo*)
 Instituto Hodler 107
 Instruado 17, 24-27, 36, 62-64, 68, 69, 79, 92, 93, 112, 138, 159, 160, 166, 177, 179, 196, 199, 203
 Interlingvistiko, esperantologio 57, 58, 68, 150, 199, 212
 Interlingua 120, 137
 Internacia Esperanto-Muzeo 182
 Internacia Kongresa Universitato 170, 178
 Intervjuoj 9, 17, 42, 62, 84, 87, 89, 127, 147, 149
 Irano 130, 218
 Irlando 19, 104, 192
 Islando 191
 Israelo 138, 161
 Issert, M. 172
 Italio 18, 19, 25, 26, 37, 48, 51, 78, 98, 138, 139, 177, 217
 Iwi, A. 21
 Jacobsen, J.L. 7, 21
 Jansen, W. 192, 193
 Jansen-Miglioli, M. 193
 Japanio 48, 58, 98, 125, 131, 162, 177, 198
 Jegorovas, P. 82, 109, 110, 202, 211
 Jugoslavio 99
 Junularo 78, 84, 105, 111, 188
 Jurkiv, M. 97
 Ĵurnalismo 98, 158
 Kafka, F. 3, 169
 Kalendaro 53, 126, 186
 Kamačo, G. 27, 34, 74
 Kamerunio 154, 171
 Kampanio 2000 145
 Katalunio 14, 37, 58, 67, 119, 130, 132, 139, 144, 179, 216
 Katolikismo 51, 58, 87, 98
 Keefe, D. 196
 Kenjo 13
 Klemola, I. 20
 Kobayashi T. 162, 178
 Kočvara, V. 142, 154
 Komerco 16, 138, 179, 199
 Komitato 106, 144
 Kompaktdisko: *Un privé dans la nuit* 93
 Komputado, komputilaj retoj 77, 78, 93, 131, 157, 177, 190, 199, 208
 Komunistoj 216
 Kongresoj, aranĝoj
 4-a Afrika 21, 110
 3-a Amerika 61
 12-a Aŭstralia E-Somerlernejo 65
 1-a Azia 181
 80-a Brita 119

8-a EOLA 119
 2-a Esperanta Eŭrop-Unia 111, 172
 30-a Internacia Infano 160
 52-a Internacia Junulara 130, 188
 39-a Internacia Seminario 38
 83-a Japano 177
 27-a Kataluna 14
 27-a Korea 12
 5-a Kultura E-Festivalo, 177
 12-a Printempa Semajno Internacia 119
 3-a Togolanda 65
 80-a Universala 108
 81-a Universala 45, 91, 141-160, 162-164, 170
 82-a Universala 81, 123, 144, 210
 83-a Universala 81
 Konopka, H. 203
 Korjenevskaja, N. 214
 Koreio 12, 110, 125, 201
 Kostariko 61
 Kotizoj 26, 145, 166
 Koutny I. 198
 Kroatio 48, 58, 78, 111, 117, 130, 138, 177, 184, 199, 207, 217
 Kubo 79, 110, 177
 Kulturo 9, 22, 113, 168, 204-207, 216
 Künzli, A. 211
 Kurisu K. 7
 Kuroda M. 80
 Kurucz G. 159, 199, 214
 La Colla, S. 193
 Lagrange, G. 174, 179, 205
 Lapenna, B. 145
 Lapenna, E. 152, 217
 Lapenna, I. 138, 149, 198
 Laste aperis 15, 35, 57, 75, 95, 118, 135, 155, 175, 195, 215
 La Torre, M. 24, 26
 Latvio 211
 Laval, R. 140
 Lécaille, P. 121
 Ledon, G. 148
 Lee C.-Y. 1, 12, 37, 41, 81, 82, 109, 142, 144, 154, 164, 181, 201
 Lelarge, S. 156
 Leoni de León, J.A. 61
 Le Puil, J. 8, 14, 74, 148
 Libro:
Aboco de tempoplanado, La 33, 138
Anne Frank ne estas de hieraŭ 127
Apenaŭ papilioj en Bergen-Belsen 174
Asteriks kaj Kleopatra 74
Asteriks, la gladiatoro 74
Buton-milito, La 34
Comprehensive English-Esperanto dictionary 8
Dekamerono 194
Dezerto de la Tataroj, La 194
Floroj de l' krepusko, La 174
Fragmentoj 33
Frailino de Scuderi 71
Germanaj klasikaj noveloj 71
Grand Dictionnaire Français-Espéranto 8
Generala, organika kaj biologia kemio 214
Hetajro dancas 8
Historio de Japanio kaj Koreio: Enkonduko 134
Interna vivo de Esperanto, La 94, 137
Kiel fidela hundo 37
Kunularo de l' Ringo, La 32
Kunvojaĝo 27, 216
Latina kiel interlingvo, La 134
Lumo en tenebroj 7
Meslibro kaj legajaro por dimanĉoj kaj festoj 87
Metodiko de la E-instruado 27
Milito kontraŭ salamandroj 7
Mil unuaj vortoj en Esperanto 93
Ne nur soldato Ŝvejk 7
Parollturnaro germana-Esperanto 73
Plena poemaro (Mihalski) 73
Principindoj Mary 214
Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj 94
Rondo familia, La 72, 137
Sen titolo 117
Servado de la perfekta lingvo, La 133
Servisto de l'ideo 72
Sukcesa mamutrado 34
Sveda alumeto 214

- Tena 58, 174
Teorio kaj praktiko de lingvo-instru-
ado 27
Unua amo, La 214
 Vivprotokoloj 29
Vocabolario italiano-esperanto 193
 Libroservo de UEA 76, 107, 168, 217
 Lindstedt, J. 122
 Lingvo, lingvistiko 18, 98, 137, 179
 Lingvopolitiko 10, 11, 30, 78, 89, 102,
 113, 147, 150, 162, 179
 Lins, U. 110, 134, 138, 162
 Lipari, M. 87, 108, 111, 113, 144, 154,
 184
 Literaturo 6, 32, 98
 Litovio 82-83, 111, 211
 Llech-Walter, R. 139
 Lloancy, R. 101
 Lo Jacomo, F. 121, 151, 184
 Löwenstein, A. 26, 32, 34, 151
 Ludwig, E. 189
- M**abesoone, P.M. 180
 MacGill, S. 17, 93, 152, 214
 Madagaskaro 13, 156, 177
 Maizen, H.M. 28
 Malavio 125
 Malovec, M. 2-3, 158, 159, 176
 Malto 48, 78
 Manifesto de Prago 144, 146, 191, 201
 Martinelli, P. 30, 117, 194
 Masala, B. 86, 121, 208, 216
 Matthias, U. 69
 Mattos, G. 128
 Maul, S. 9, 149
 Mayer, H. 6, 183
 Mayor, F. 142
Mazi en Gondolando 17, 203
 Mazde, O. 21, 125
 McCoy, R. 47
 Medicino 177
 Meksiko 207
 Membraro de UEA 46, 47, 105
 Mihalski, E. 73
 Milojević, S. 1, 38, 217
 Minnaja, C. 128, 133, 193, 194
 Mjeda, Z. 144, 167
 Modest, J. 206
 Moerbeek-Bartels, N. 127
 Monda Federacio de Sciencaj
 Laboristoj 184
 Monda Kunagado 29, 149
 Montagut, A. 14, 74, 179
 Movado sen Nomo 103
 Mozambiko 125
 Muzeoj 78, 129, 182, 202
 Muziko 34, 37, 153, 178, 209
- N**ederlando 14, 38, 52, 102, 124, 127,
 131, 138, 190, 192, 198, 199, 217
 Nekrologoj 20, 40, 59, 60, 80, 100,
 120, 165, 180, 200, 218
 Nepalo 110, 177
 Nervi, M. 14, 71, 169
 Neves, G. 6, 31, 74
 Ngangu, N. 178
 Niĝerio 171
 Nitobe, I. 1, 141, 147, 154, 162
 Norvegio 78, 97, 207
 Novobilský, V. 142
- Nov-Zelando 65
 Nto Nto, V. 154, 171
 Nzaniye J. 13
- O**ficila Informilo 20, 39, 56, 80,
 100, 140, 180, 200, 220
 Olmos, A. 98
 Onet, I. 8
 Orellana Rojas, A. 9, 61, 110
 Ó Riain, S. 51, 170, 192
 Osho-Davies O. 96
 Ostwald, W. 212
- P**arolspuro 145
 Parzyszek, J. 202
 Peeters, Y. 141, 154
 Pettyn, A. 75, 83, 159, 165
 Phillips, R. 147, 154, 162
 Pić, K. 6
 Pietiläinen, J. 188
 Piliponis, A. 82
 Pirlot, G. 11, 109, 189, 191
 Piron, C. 97, 113, 123, 129
 Polgár, familio 62-64
 Politiko 42-44, 199, 216
 Pollando 17, 38, 75, 83, 85, 97, 119,
 198, 202
 Portugalio 138, 192, 216
 Premioj
 Deguči 113, 15
 de EVA/Edistudio 32
 Kulturpremio de FAME-Fondaĵo 113
 de OSIEK 113, 216
 Subvencio Cigno 154
 Princz O. 50, 192
 Puig, L. 58
 Pupteatro 78
 Puramo Ĉong 12, 181
- R**adikala Partio 42-44, 109
 Radio 38, 75, 78, 86, 138, 177, 208
 Rados P.A. 152
 Rannisto, A. 200
 Rapley, J. 69, 77, 170
 Rašić, N. 36, 74, 150, 192
 Ratajczyk, J. 83
 Raveloson, E. 13
 Reagoj 77, 137, 172
 Recenzoj 7, 27, 32, 71, 93, 117, 133,
 174, 193
 Resende, R. 137
 Revuoj
 L'alpa kanguruo 75
 Bukureŝta Informilo 75
 Debrecena Bulteno 117
 Esperanta ŝako 62
 Esperanto 81, 108
 Espero 75
 Espero el Koreio, La 110
 Evangeliaj Kajeroj 117
 Eventoj 98
 FEN-x 117
 Fonto 9
 GEJ-Gazeto 117
 Informoj de Estona E-Asocio 211
 Juna Amiko 214
 Kontakto 108
 Lanternio Azia, La 111
 Latvia E-isto 211
 Literatura Foiro 117
- Litova Stelo 211
 Medicina Internacia Revuo 75
 Perloj 75
 Pragaj Sonoriloj 158
 Scienco kaj Kulturo 117
 Verda Proleto, La 117
- Reza 198
 Riesco, F. 41
 Rifugintoj 13
 Robineau, B. k M. 98
 Rogers, D. 65
 Rolfo 188
 Rossi, N. 149, 153
 Rössler, F.-G. k R. 138, 178
 Ruĝa Kruco 191
 Rumanio 18, 52, 78, 105, 199
 Rusio 22, 48, 78, 79, 97, 98, 111, 139,
 209, 214
- S**akamoto S. 120
 Schad, W. 16
 Schouten-Buys, A. 172
 Schram, J. 77
 Scienco 28, 37, 98, 184, 185, 217
 Seemannová, E. 144, 153, 167
 Selten, R. 37, 98, 149, 198
 Sennacieca Asocio Tutmonda 114
 Serba Respubliko 144
 Sigurdsson, S. 104
 Sikosek, Z.M. 129, 130, 136, 192
 Silfer, G. 74, 152, 179, 212
 Sirio 177
 Sirovec, S. 152
 Skūpas, A. 83
 Slovakio 170, 216
 Slovenio 79
 Smidliusz K. 17, 112
 Smythe, J.E. 160
 So Gilsu 110
 Sociologio 36, 72
 Solo 178
 Spiritistoj 145
 Steele, T. 74, 79
 Stocker, F. 11, 78Stop-Bowitz, C. 151
 Str-angulo 160
 Strategio de UEA 145, 146
 Stryhn Meyer, J. 109, 121, 199
 Svedio 51, 97, 138, 177, 179
 Svislando 19, 51, 75, 97, 98, 161, 212
 Symoens, E. 29, 40, 129
 Szerdahelyi I. 212
 Szilvási L. 78, 212
- Ŝ**ako 62-64
 Ŝemer, J. 151
 Ŝirjaev, I.G. 117
 Ŝtimec, S. 117, 130, 177, 184, 198
 Sulco, R. 178
- T**akeuti Y. 181
 Tan Xiu-hu 119
 Tanzanio 21, 110
 Tautorat, H.D. 140
 Tavanti, C. 59
 Teatro 22, 143, 152-153, 177, 204-207
 Teatraĵoj
 La amo patra 23
 Lanĉo 152
 Lordino Makbeto en koncert-kafejo
 152
- Mi, Eliza Premislida* 153
Stilekzercoj 152
Triptiko 152
Unua brandfaristo, La 22, 142
 Televido 19, 58, 129, 130, 192, 203
 Terminologio 24, 99
 Terzjev, D. 154
 Thorsen, P. 34, 177
 Tišljär, Z. 74, 130, 150
 Togolando 65, 105
 Tomecki, A. 17
 Tonkin, H. 74, 102, 109, 113, 150,
 162, 217
 Tradukado 37, 58, 78, 99
 Trifončovski, L. 117, 179
 Triolle, R. 110, 159
 Trinxin 153
 Turismo 78, 177, 199, 217
- U**kraĵio 48, 199, 216
 Ullestad, K.H. 107
 Unesko 36, 41, 109, 121, 142, 148,
 214
 Ungar, K. 74, 119
 Universitato de la Tria Aĝo 69
 Universitatoj 25, 68, 78, 79, 112, 198,
 199, 212, 216
 Unuigintaj Nacioj 10, 41, 109, 142
 Urbanová, E. 4, 8, 74, 144, 167
 Usono 19, 52, 58, 166, 217
 Uzbekio 78
- V**aitilavičius, A. 137
 Valén, A. 33, 74
 Valente, G. 150
 Verduljo 50
 Verloren van Themaat, W. 99, 198
 Veuthey, F. 74, 99
 Vibendoj 17, 19, 166
 Vjetnamio 111, 144, 181, 192
 Vlk, Kardinalo Miloslav 143
 Vondroušek, J. 40
 Vortaroj 8, 58, 73, 79, 193, 211
- W**andel, A. 28, 74, 88, 98, 103, 106,
 109, 113, 114, 138, 150, 151, 213
 Wang T. 16
 Waringhien, G. 194
 Weichert, M. 81
 Wells, J. 113, 141, 150, 178
 Williams, N. 218
 Wouters, M. 173
 Wylleman, R. 159
 Wynne Jones, A. 141, 147, 154
- Y**amasaki S. 106, 128, 149, 150, 181
 Yamazoe S. 177
 Yu T. 192
 Yushkiavitsush, H. 121
- Z**airio 13, 178
 Zakrjevski, A. 22
 Zaleski-Zamenhof, L.C. 143, 203
 Zambio 125
 Zamenhof, L.L. 22, 101, 122, 173
 Zamenhof-tago 48
 Zapelli, P. 81
 Zdechlik, A. 77
 ZEO-j 19, 25, 37, 78, 177, 185
 Zimbabvo 125

OFICIALA INFORMILO

PATRONOJ DE TEJO 1996
 Germanio: Helmut Klünder.

SOCIETO ZAMENHOF 1996
 Hispanio: Pere Juliá.

DONACOJ (1996)
 ĝis la 11-a de novembro

Fondaĵo Afriko: Anonime 5000,00. Italio: D. Trombetta 2390,25. Nederlando: A. T. ten Hagen 2612,00. Svedio: J. Hammarberg 62,75. Sumo ĉi-jara 22 256,69.

Fondaĵo Ameriko: Finnlando: T. Sormunen 100,00. Sumo ĉi-jara 4643,09.

Fondaĵo Kanuto: Aŭstralio: P.J. Desailly 11,17. Ĉinio: Z. Gao 17,88; Y. Zhang 6,71. Finnlando: H. Kesälä 20,00. Britio: D.R. Curtis 11,80; E. McCanlis 10,00; W.H. Simcock 9,45. Japanio: M. Aihara 29,80; Y.

Akada 296,40; H. Egawa 61,68; K. Hirose 29,80; Y. Hori 29,80; Y. Hukahori 30,84; Y. Hukahori 29,64; H. Isobe 29,80; R. Karibe 29,80; K. Katou 61,68; T. Kobayasi 29,80; K. Kosaka 29,80; H. Kuriyama 29,80; S. Minaba 29,80; Y. Mine 89,40; I. Miyamoto 29,80; E. Miyosi 29,80; N. Nisimura 29,80; H. Okuda 29,80; T. Saitou 74,50; W. Schmid 29,80; T. Somekawa 59,60; T. Sugano 29,80; K. Syozi 154,20; H. Tai 29,80; N. Takahasi 30,84; S. Turuta 29,80; T. Ueda 29,80; S. Yamazoe 149,00; M. Yunokawa 59,28. Nederlando: N.C. Kuiterman-v. Goor 15,00. Usono: C. Schulze 29,80. Sumo ĉi-jara 11 158,02.

Ĝenerala Kaso: Germanio: Esperanto-Blindenverband 279,61; M. Gründler 70,56; F. Huber 20,18. Francio: M. Feneyrol por Societo Zamenhof 1978,48. Japanio: T. Saito 200,00. Nederlando: G.H.M. Wulfers-Meddens 1000,00. Sumo ĉi-jara 7834,54.

Konto Espero: Francio: R. Picou 33,00. Nederlando: Faulhaber-Semajnfino 720,00; D. Krombeen 50,00; W.P. Roelofs 200,00. Sumo ĉi-jara 2540,01.

Fondaĵo Oficeja Ilaro: Finnlando: S. Mynttinen 190,00. Nederlando: P. Zapelli 1500,00. Sumo ĉi-jara 2211,80.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Aŭstralio: A. Bishop 67,50; R. Harry 280,00. Finnlando: H. Kesälä 20,00. Britio: E. McCanlis 10,00; W.M. Simcock 9,45. Nederlando: N.C. Kuiterman-v. Goor 20,00; E. Visser 7,00; R. de Vries 35,00. Usono: R.F. Grossman 25,00; D. Holland 100,00; M. Kennedy 94,50. Sumo ĉi-jara 3829,37.

Volontula Fondaĵo: Aŭstrio: S. Stamm 25,00. Finnlando: H. Kesälä 20,00. Britio: E. McCanlis 10,00; Fam. Najbaro 5,00. Irlando: M. Mullarney 50,00. Sumo ĉi-jara 890,00.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA



Dumonata soci-kultura revuo el Ruslando.
Fondita en 1909. Refondita en 1991.
28 gld. ĉe UEA aŭ egalvaloro ĉe pli ol 20 perantoj.

Modernaj ekipaĵoj pliefikigas la laboron de la Centra Oficejo.

FONDAĴO OFICEJA ILARO

bonvenigas ankaŭ vian donacon. Koran antaŭdankon!

La filmo

SPUROJ DE LA AVO

(60,00 gld. ĉe la Libroservo de UEA)
montras lokojn lititajn kun la
Zamenhof-biografio. Ĝia profito
estas destinita por la rekonstruo de
la naskiĝdomo en Bjalistoko.

Tuta biblioteko en unu libro!



El ĉiuj aperintaj volumoj en la Jubilea Kolekto
de UEA, tiu ĉi – la kvina – plej bone prezentas
la tutan lingvon, ĝiajn varion kaj fascinan.

Nova Esperanta Krestomatio

Redaktis William Auld.

509 p. Tole bindita kun kromkovrilo.
57,00 gld.; nur 38,00 gld. ekde 3 ekzempleroj.

ANONCU EN JARLIBRO 1997!

En la Jarlibro de UEA via anonco pri Esperanto-
aranĝoj, libroj, gazetoj k.a. varoj atingos pli vastan
publikon ol en iu ajn alia Esperanto-eldonaĵo.
Pli ol 7000 aktivaj esperantistoj plurfoje vidos
vian reklamon, ĉar la Jarlibron oni konsultas
tra la tuta jaro.

Movada prezo Ekstermovada prezo

Kvarona paĝo	120 gld.	240 gld.
Duona paĝo	220 gld.	440 gld.
Tuta paĝo	400 gld.	800 gld.
Kovrilpaĝo	800 gld.	1600 gld.

Se vi varbas ekstermovadan reklamon, ni pagos
al vi 30% de la prezo kiel makleraĵon. Anonc-
mendiloj haveblas en Esperanto, la angla, franca,
germana kaj nederlanda. Limdato por la mendoj:
31-a de januaro 1997.

Edward Symoens:

BIBLIOGRAFO DE DISERTACIOJ PRI ESPERANTO KAJ INTERLINGVISTIKO



*Tiu ĉi grava informfonto (1989; 159p.)
estas nun ĝisdatigita per 63-paĝa
suplemento. Kune ili priskribas
preskaŭ 250 universitatajn studojn.*

Baza libro 21,00 gld.; suplemento 7,20 gld. *Oferto:* Ambaŭ kune 23,50 gld.

Internacia Rondo Esperantista PROSPERO

anoncas pri sia nova adreso:

Zinovi Kurolap, 1881 Steeles Avenue West, Suite 216,
North York, Ont., M3H 5Y4, Kanado.

☎ 1-416-6505277 (10am-9pm) ☎ 1-416-6507102 (24h)

✉ prospero@globalserve.net

Gesamideanoj!

VIA PROFESIO interesas nin. Indiku ĝin al ni!

TAKE – LA DOMO
RN 83 – Rue de Tiefenbach
FR – 68920 WINTZENHEIM
Donaceto atingos vin!



Ĵen **la plej**

vaste legata junulara gazeto
 rekomendinda por komencantoj
 bela kaj moderna
 diversa kaj amuza
 interesa por ĉiuj

KŬIARTO estas gazeto
 por ĉiu kiu serĉas interesan
 legaĵon en Esperanto. Ĉiu
 numero havas ankaŭ tekstojn
 en tre facila lingvo, tiel ke
KŬIARTO estas aparte taŭga
 por komencantoj kaj por
 Esperanto-kursoj. Krome,
 konkurso atendas vin en
 ĉiu numero de la revuo!
 En 1997 **KŬIARTO** aperos
 6-foje. Abonu rekte de UEA
 aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFO 1997

Aŭstralio	28 dolaroj	Francio	120 frankoj	Nederlando	38 guldenoj
Aŭstrio	240 ŝilingoj	Germanio	34 markoj	Norvegio	140 kronoj
Belgio	700 frankoj	Hispanio	2100 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	29 guldenoj	Portugalo	2400 eskudoj
Britio	15 pundoj	Italio	31000 liroj	Svedio	150 kronoj
Danio	130 kronoj	Japanio	2600 enoj	Svislando	28 frankoj
Finnlando	100 markoj	Kanado	29 dolaroj	Usono	22 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj
 ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**




En 1996 248 esperantistoj subtenis
 la agadon de UEA per aliĝo al

Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de
 mecenatoj de UEA. Vi ricevos leterojn de la
 prezidanto de UEA, inviton al akcepto en UK
 kaj donaceton kun la Jarlibro, kiu en
 1996 estis bela SZ-globkraĵono. La
 kotizon (duoblo de MA por via
 lando) vi povas pagi al via peranto
 aŭ rekte al UEA.



Dua, pliampleksigita
 eldono de dudirekta
 vortaro de grava
 afrika lingvo, fare
 de renoma lingvisto.



16+158p.
 Prezo: 18,00 gld.

Antaŭ 50 jaroj datiĝis la lasta letero de
 talenta knabino, pereonta pro rasismo.



Legu, legigu

*Anne Frank
 ne estas de hieraŭ*

Speciala prezo ĝis la fino
 de januaro 1997:
 15,00 9,90 gld.

194p. Trad. Nora Bartels.
 (Vd. intervjuon kun ŝi en
 jul.-aŭg., p.127.)

LA PLEJ KONATA LIBRO
 PRI FAKA TEMPOUZO,
 NUN EN ESPERANTO!

Lothar J. Seiwert:

La aboco de tempoplanado



Rotterdamo: UEA 1995. Serio Konsilaroj por Aktivuloj
 n-ro 2. 53 p. Prezo: 7,50 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

La Adelajda UK proksimiĝas...



**...per
 kanguruaj
 saltoj!**

**Atende al Adelajdo, plibeligu viajn
 korespondaĵojn per la glumarko
 de la 82-a Universala Kongreso!**

Diametro 36mm. Flavo kaj verdo sur blua fono.
 Folio de 10 glumarkoj: 3,00 gld.
 Triona rabato ekde triobla kvanto.